


D. HEILIGSTEIN

Elkroatisis : K. Barković

LA BLANKAJ GARDISTOJ



La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut

136B *1980* 5 FF

Dragoslav Heiligstein :

" B L A N K A J G A R D I S T O J "

Instruaj rakontoj pri sano por la infanoj

Elkroatisis : Krešo Barkoviĉ.

Desegnis : Valo.


Kruelaj armeoj	... 3
Blankaj gardistoj	... 10
La bandito Tifo	... 20
Fragaspektaj invadistoj	... 29
Dukapaj ledistoj	... 38
Lentuga sangsuĉanto	... 46
Fosistoj	... 55

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

1980 *

K R U E L A J A R M E O J



KRUELAJ ARMEOJ

Rakonto pri plej gravaj homaj malamikoj

Dum bela vetero la homoj multe promenas en freŝa aero. Ne nur pro simpla promenado, sed ankaŭ multajn laborojn oni faras en freŝa aero. Bela vetero stimulas ĉe homoj la volon al laboro, kaj tiel ili laborante aŭ amuzante sin, alvenas al diversaj lokoj. Ili renkontiĝas kun aliaj homoj, prenas en la manojn diversajn objektojn kaj eniras ofte malsekajn ejojn. Ĉie, kie la homo cirkulas, vivas kruelaj soldatoj, kiujn oni ne povas vidi per okuloj, kaj pro tio estas malfacile defendi sin kontraŭ ili.

Tiuj sekretoj estis konataj al iu maljunulo, kiu vivis en sia dometo sur iu ĉarma monteto. Longa blanka barbo, nigraj okuloj, brilaj kaj saĝaj, kvieta kaj saĝa konduto, havigis al la maljunulo grandan estimon de ĉiu. Aparte amis lin la infanoj, ĉar li konis multe da instruaj rakontoj, utilaj al infanoj kaj al ĉiu homo, kiu ŝatas sian vivon. La tuta regiono konis lin, kaj oni nomis lin Maljuna Magiisto.

Vere la maljuna Magiisto multon sciis. Li posedis multe da libroj, el kiuj li legis aŭ skribis en ilin. Lian solecan vivon plivigligis la vizitantoj, ĉefe vilaĝanoj kaj iliaj infanoj.

Kiom la Magiisto aĝis, de kie li alvenis ĉi tien, neniu sciis; tio estis sekreto. Ĉiuj liaj libroj kaj instrumentoj por observado de tre etaj estaĵoj, estis al vilaĝanoj kaj speciale al infanoj, plenaj da mistero. Pro tio ili estimis maljunan Magiiston pli ol iun alian homon.

La infanoj ofte vizitis la Magiiston por aŭskulti liajn rakontojn. Li estis tre bonkora kaj kvieta maljunulo. La infanojn li sidigis ĉirkaŭ la malalta tablo, sur kiu jam troviĝis malfermita libro, kaj ili rigardis bildojn. Strangaj bildoj! Ili prezentis etajn vivantajn estaĵojn, terurajn militistojn plenaj de veneno, kiuj estas tre persistaj en siaj atakoj. Pro tio la Magiisto nomis ilin batalantoj aŭ ofte soldatoj. Ili diferencas unuj de la aliaj kiel la soldatoj, nur laŭ ekstera aspekto, sed laŭ sia militemo ĉiuj egalas : ĉiuj estas venenistoj kaj murdistoj, kiuj mortigas homojn, bestojn kaj eĉ la vegetaĵojn.

Iun belan tagon alvenis multaj infanoj ĉe maljuna Magiisto. Tiam la maljunulo komencis rakonton pri "Kruebla armeo", homaj malamikoj. La infanoj tre atente aŭskultis la rakonton.

- Antaŭ multe, multe da jaroj fariĝis iu granda armeo kun multe da soldatoj. Ili estis tre diversaj. Pluraj el ili ŝatis la homojn kaj deziris al ili nur bonon, kaj la aliaj estis teruraj kaj mortigaj. Tiuj bonaj batalantoj kaj la malbonaj formis kune grandegan armeon, kies komuna nomo estas bakterioj. Jen, rigardu! Sur tiu ĉi bildo oni vidas diversajn bakteriojn. Ili estas tre etaj, kaj sur la bildo ili estas pligrandigitaj pli ol miloble.

Iun tagon la komandanto de la armeo kunvokis ĉiujn bakteriojn. Efektive, ĉiuj alvenis por vidi, kia estos la ordono. En la armeo la ordono estas la ĉefa afero. La ĉefkomandanto surrajdis iun raton kaj de sur la pinto de ĝia orelo, li ekkriis al la bakterioj :

- Mi ordonas al vi, ke de nun vi foriru al ĉiu flanko de la mondo. Vi eniru en ĉiun marĉon, en ĉiun kanalon, en ĉiun balaaĵon kaj sterkejon. Same en ĉiun malnovan ĉifonon kaj humidajn ejojn, en ĉiun vundon, en haŭton de vivanta estaĵo aŭ kadavro, en ĉiun malluman lokon. Surgrimpu ĉiun muson kaj raton, hundon kaj katon, muŝojn, pulojn kaj pedikojn. Ni estas tiel etaj, ke ni povas raj-

di eĉ sur plej eta insekto kaj ankoraŭ pli sur la rato kaj aliaj grandaj bestoj.

Vojaĝu nokte. La suno damaĝas al ni kaj volas mortigi nin. Vojaĝu tra marĉoj, kanaloj kaj aliaj malpuraj lokoj, kien ne venas homo, nia dua malamiko. Ĉar la homo estas nia malamiko, mi ordonas al vi torturi kaj mortigadi lin. Surrajdu pulojn kaj pedikojn kaj ili transportos vin en la sangon de homo aŭ iu besto.

Ĉu vi aŭdis la ordonon ?

- Jes, ni aŭdis !

Sed baldaŭ okazis tumulto en la tendaro. Multaj specoj de bakterioj komencis krii :

- For la komandanto ! Ni ne volas lin ! Ni ne volas plenumi tiun ordonon !

La aliaj kriis :

- Ni volas, jes ! Ni plenumos tiun ordonon ! Vivu nia komandanto !

- Kiu ne volas plenumi mian ordonon ? - demandis la komandanto.

Anonciĝis multaj bakterioj.

- Kial vi ne volas ? - demandis la komandanto.

- Ni ne volas murdadi homon, sed male ni volas helpi lin.

- Vi estas stultuloj. Kial helpi al tiu, kiu volas vin mortigi, kiu elpensas diversajn manierojn por malaperigi vin ?

- Ne estas vero. La homo mortigas nur tiun, kiu lin mortigas. Kaj, ĉar vi decidis murdadi, estas tute normale, ke ankaŭ la homo provos mortigi vin. Oh, kaj li scias mortigi ! Ni timas homon.

- Malkuraĝuloj - vi timas, sed mi ne timas. Ni estas tiel armitaj per venenoj, ke ni ne niun timas.

- Ni ne volas iri kun vi !

- Se vi ne volas, ni punos vin. Mi simple lasos vin al suno kaj homo, kiuj mortigos vin.

- Ni timas nek sunon nek homon. La homo ŝirmos

nin de la suno. Li estas al bonaj bona kaj al malbonaj malbona.

- Vi tiel aroge parolas antaŭ la komandanto de plej granda kaj plej forta armeo en la mondo ! Mi kapablas kun mia armeo ekstermi kaj mortigi tutajn landojn kaj popolojn, kaj vi kuraĝas tiel aroge obstini al mi.

- Ni formanĝu malobeulojn ! - ekkriis iu soldata bando.

- Ne, ni ne manĝu ilin ! Sed, de nun ĉiu aparte. Kun ribeluloj ni ne havos kontakton. La armeo dividiĝu. Unuj dekstren, aliaj maldekstren ! La ribeluloj maldekstren, la batalantoj dekstren !

Granda armeo ekmoviĝis. Okazis interpuŝado. Koleraj kaj kruelaj batalantoj puŝadis kaj faligadis siajn pacemajn fratojn kaj insultadis ilin diversmaniere.

- Perfiduloj ! - kriegis kruelaj batalantoj, sangsoifaj soldatoj.

- Ni ne estas perfiduloj sed helpantoj al homo.

- Vi estas senenergiuloj ! Rapide maldekstren, por ke ni pli rapide disiĝu.

De sur la orempinto de rato atente rigardis la komandanto tiun armeon kaj ĝiajn movojn. Kiam ili disiĝis al du flankoj, la komandanto ektondris :

- Perfiduloj ! Ne kuraĝu proksimiĝi al ni.

- Ne insultu nin ! - respondis maldekstra flanko.

- De nun, - daŭrigis la komandanto - ni estas du mondoj. Inter ni kaj vi ne plu eblos komuna vivo kaj laboro. Vi deziras helpi homon kaj do laboru por li. Ni mortigados lin venenante lian sangon.

- Tio estas terura kaj maljusta - oni aŭdis kriojn el la viĉoj de bonaj kaj utilaj bakterioj.

- Bone, nun ni estas dividitaj. Bedaŭrinde, ni ĉiuj estas bakterioj, sed pro via publika ribelo kaj perfido, nia granda familio disdividiĝis. Ĝi ekzistas ankoraŭ nur laŭ la nomo, sed ne laŭ komuna laboro. Vi helpados homon kaj vivon kaj ni detruados ilin. Al vi kadavroj kaj al ni vivaj korpoj. Vivo kaj morto ne povas kunekzisti samtempe.

- Vi do estas morto, vi dekstruloj - oni kriis de maldekstre.
- Ni ne estas morto, ni nur povas kaŭzi morton. Kaj vi de nun vivu sur mortaj aĵoj. Kiel estas malbele rampi sur putrintaj objektoj. Vi ne havas dignon!
- Kaj kiel estas malbele murdadi kaj esti rabisto.
- Ne plu ni disputos, kaj ni forgesos vin. Nenion plu ni volas aŭdi nek scii pri vi, la degenerintoj.

Maldekstra armeo foriris. Baldaŭ ĝi aperis en la mastrumado kaj faris multe da helpo kaj servo al la homo.

- Kiajn servojn ĝi faris ? - demandis iu knabo al maljuna Magiisto.
- Jen kiajn. En la malto de via patrino loĝas tiuj bonaj bakterioj, kiuj fermentas kaj helpas, ke la pano estu pli bongusta. Kiam via patro alkondukas vinbersukon en la kelon, ĝin eniras bakterioj, kiuj laborante en la varmo transformas sukon en vinon. Via patrino gardas lakton en la varmo, kaj dank'al bakterioj ĝi acidigas. El ĝi oni faras fromaĝon. Neniam ekzistus fromaĝo sen tiuj bakterioj. Kaj kiom ili helpas al ni, putrigante la kadavrojn. Ili estas tre utilaj al ni.

Kaj la alia armeo, tiu batalema, restis tie kaj dividiĝis en tri partojn. Ĉiu el tiuj tri partoj estas aliforma kaj pro tio ili ne iris en saman direkton.

Ilia komandanto diris :

- Grandega armeo ! Laŭ viaj formoj mi faros el vi tri grupojn. Tiam vi iru en la mondon kaj destruu laŭ via deziro. Al vi mi donos plej fortajn venenojn, por ke vi estu fortaj. Armeo sen armiloj valoras neniom. Ju pli bonaj armiloj des pli da viktimoj.

La komandanto prenis la pozon de vera generalo. Nemirinde. Tiu ĉi armeo estas tiel terura kaj senskrupula, ke kun ĝi oni ne povas kompari

iun ajn el plej teruraj armeoj en la homa historio. Tiel perfektan kruelecon ne montris la armeo de Atila, nek tiu de Batu-kan, nek la armeo de iu alia sovaĝa tribo.

La komandanto daŭrigis :

- La unua grupo, unua armeo estos tiuj ĉi sveltaj bastonetoj, baciloj. Via tasko estas penetradi en la homajn pulmojn, medolojn, intestojn. Vi kaŭzos diversajn difteriojn, tifojn kaj speciale ĥoleron, peston kaj tuberkulozon. Efektive, en la homa sango vi renkontos gravajn kaj tre kuraĝajn kontraŭulojn, kiu formangegos milionojn el vi, sed malgraŭ tio vi devas daŭrigi vian taskon. Tiuj viaj kontraŭuloj estas blankaj gardistoj, same etaj kiel vi, ke en la papavero oni povus meti plurajn milojn el ili. Tamen vi ne timu ilin, kaj akceptu ĉiun batalon. Tio estas mia ordono. Neniam retirigu antaŭ la malamiko ! Antaŭen, mia unua kaj plej granda armeo ! Jen, la tuta terĝlobo estas via. Vi de hodiaŭ estas ĝiaj mastroj. Ĉiujn homojn kaj ĉiujn bestojn mi transdonas al vi kiel nutr-aĵon. Manĝu kaj progresu ! Antaŭen !

Tiu ĉi grandega armeo foriris kaj disvastiĝis en la tuta mondo. Ĝi eniris en la palacojn de riĉuloj kaj en la kabanajn de mizeruloj; en brilajn salonojn kaj en malriĉajn humidajn subtegmentajn loĝejojn. De tiam, kaj jam pasis miloj da jaroj, tiu ĉi armeo mortigas junulojn kaj maljunulojn. Tamen ĝi preferas junajn vivojn. La nombron de ĝiaj viktimoj oni ne konas.

- Dua armeo ! Vi havas formon de frago (streptokokoj). Vi kaŭzos terurajn malsanojn : skarlatinon kaj aliajn. Via laborkampo estos infanoj. Ke la homo, kiu evitis mem malsaniĝi de tuberkulozo, suferu, rigardante, kiel mortas lia infano. Antaŭen, mia kara armeo !

Ankaŭ tia armeo disvastiĝis en la tuta mondo, kaj longtempe estis tre, tre danĝera kaj nevenkbla. Sed hodiaŭ ekzistas kuraciloj, kaj ĝi estas malpli danĝera.

- Tria armeo ! Vi havas spiralan formon (spiri-
loj). Vi kaŭzos ĉe homoj terurajn abscesojn. Ili estos tiel aĉaj, ke de ili suferos eĉ nepoj kaj pranepoj de malsanaj homoj. Vi ja estas tiel belaj, fortaj kaj rezistemaj. Ve al la homo, kiun vi atakos.

Tiel la tri armeoj disvastiĝis sur la terglobo. De tiam, kaj jam pasis miloj da jaroj, vivas tiu malica armeo en marĉetoj, marĉoj, balaejoj, humidaj lokoj, ombroj kaj malseka grundo. De tie alvenas tiuj teruraj soldatoj en la trinkeblan akvon, sur la panon kaj en mang-aĵojn. Neniam ni estas sufiĉe singardemaj por tute eviti ilin.

Ili gluiĝas sur la muŝojn, kiuj marŝas sur la pano kaj la kukoj. Pedikoj kaj puloj ŝprucigas ilin en nian sangon, mordante nin. Ili troviĝas ankaŭ sur la musoj kaj ratoj, sur la bestofeltoj kaj birdoplumoj.

- Kiel ni povas protekti nin de tiuj teruraj malamikoj ? - demandis iu knabineto al maljuna Magiisto.

- Tio ne estas same facila ĉe ĉiu homo, bedaŭrinde. Ĉefe ni protektas nin per la pureco. Ni devas ofte kaj bone lavi nian korpon, purigi kaj aerumi loĝejojn, kaj mortigi muŝojn, pedikojn, pulojn, musojn kaj ratojn. Oni devas surmeti purajn vestaĵojn kaj ofte ŝanĝi la subvestojn. Buŝon, nazon kaj gorgon oni devas ellavi. Nia popola proverbo diras : "La pureco estas duono de la sano".

Kiamaniere nia korpo defendas sin de tiu terurara armeo, mi rakontos al vi en aliaj rakontoj. Mi rakontos, kiel baciloj eniris homan sangon. Pri ĉiu mi rakontos unu rakonton. De nun, kiam la infanoj venis al li, la maljuna Magiisto rakontis po unu rakonton.

BLANKAJ GARDISTOJ

Rakonto pri terura milito en homa korpo

Sur verda monteto staras dometo kaj ĉirkaŭ ĝi fruktarboj kaj ĝardeneto. Sub la ĝardeneto fluas rivereto kaj de ĝi gvidas vojo al tiu ĉarma dometo. La dometo brilas en la suno. Ĉi tie loĝas maljuna Magiisto. La infanoj vizitas lin por aŭskulti diversajn instruajn rakontojn.

Ankaŭ nun sidas la infanoj ĉirkaŭ la maljunulo, kaj li rakontas al ili teruran rakonton pri la milito inter la blankaj gardistoj kaj iliaj malamikoj. Ĉio okazis en la pulmo de ĉarma knabineto Marjo, sola infano de siaj gepatroj. La maljunulo komencis :

- Foje vivis iu riĉa vilaĝana familio. Ilia domo estis plena de ĉiuj aĵoj. Ili havis ankaŭ abelejon, kiun eta Marjo ofte vizitadis por rigardi, kiel abeloj produktas mielon. Ŝi havis ankaŭ avon. Tiu kompatinda maljunulo malsaniĝis pro terura malsano nomita tuberkulozo. Li deziris ankoraŭfoje antaŭ la morto vidi sian filinon, bofilon kaj etan nepinon. Iun tagon la maljunulo vizitis ilin. Li estis malgrasa, tusetis, sed povis ankoraŭ marŝi. La tago estis same bela kiel hodiaŭ.

Al la patro de Marjo ofte venadis ankaŭ la instruisto. Li kunportis ofte la mikroskopon, por observi la abelojn kaj ilian vivon.

Tuj post la alveno de la maljuna avo, alvenis ankaŭ la instruisto kun mikroskopo.

- Ho, avo, kiel vi fartas? - demandis la instruisto.

- Malbone, sinjoro. Mi estas malsana kaj havas dolorojn en la brusto. Versajne mi ne plu longe vivos.

- Sed, avo, kia estas via malsano? - demandis eta Marjo.

- Tio estas terura malsano. Pro ĝi oni frostas, poste ŝvitas kaj oni sentas sufokecon.
- Aveto, kiel tio sufokas ? Ĉu tiel ? Ŝi preman-
te la kolon provis montri, kiel tio sufokas.
La maljuna kamarano ekridis.
- Jees, tiel, parolis la kamarano tusante.

La instruisto vokis la maljunulon al la abel-
ejo. Tie li surmetis la ĉapelon kontraŭ la pikoj.
La maljunulo ektusis kaj elĵetis tra la buŝo iom
da muko. Per la mano li viŝis la buŝon. En tiu
momento ekploris eta Manjo. Ŝia avo tuj iris ĉe
ŝi.

- Kial vi ploras, karulino, - diru al via avo.
- Abelo pikis min, respondis plorante la knabino.
- Kie ĝi pikis vin - demandis ŝin la maljuna avo?
- Ĝuste ĉi tie, sur la supra lipo - montris eta
Marjo.
- Via avo forigos la pikilon.

Kaj la avo, per de salivo malsekaj fingroj,
premis ŝian lipon serĉante la pikilon. Li sam-
tempe tuis, kaj elspiritan haladzon enspiris la
knabineto. En tiu momento eksaltis la instruisto,
por vidi, kio okazis. Tuj li rimarkis la elkraĉ-
itan salivon de la maljunulo.

- Pro Dio, maljunulo, kion vi faras ?
- Mi ja serĉas pikilon, sinjoro.
- Eĉ vi ne povas imagi, kian malbonon vi nun far-
ris per tiu elkraĉaĵo kaj malsekaj fingroj.

La avo eltiris la pikilon el la lipo kaj la
tutan lipon malsekigis per siaj mukplenaj fingroj.
- Nun, leku forte vian lipon kaj ĝi ne plu ŝvelos,
diris la avo al la eta nepino.

Tiam la instruisto per iu lignero prenis iom
da mukoza elkraĉaĵo kaj metis ĝin sub mikrosko-
pon.

- Rigardu, maljunulo, tiun milionan vivon !

La maljunulo ekrigardis en la mikroskopon kaj
vidis longajn blankajn bastonetojn, vivantajn
estaĵojn, kiuj kaŭzas tuberkulozon. Ili nomiĝas
tuberkulozaj baciloj.

- Ho, kiom da ili estas. Ĉu tiuj bastonetoj min pikas ?

- Ne, ili ne pikas sed mangas vin. Probable vi transportis ilin per via spiro kaj malsekaj fingroj, en la korpon de via nepino. Dio donu, ke tio ne okazis.

Ĉu vi vidas, karaj infanoj, kiel la avo faris grandan malbonon al sia eta nepino, nur pro nesacio? Kaj se ne estus blankaj gardistoj, la eta Marjo mortus. Nun mi rakontos, kiel la bacilo vojaĝis el la buŝo en la pulmon; kaj kiel okazis milito kun blankaj gardistoj.

Unu bacilo eniris la buŝon kaj tra ĝi atingis la pulmon. Alveninte tien, li tuj faris al si dometon. Vi, karaj infanoj, ridetas ne komprenante, kiel sur la pulmoj povas esti dometo. Mi ĉion klarigos al vi. Same kiel lerneja spongo havas truetojn en si, niaj pulmoj surhavas etajn vezikojn. En tian veziketon eniris tiu bacilo. Tuj post la eniro li montriĝis kiel vera masonisto, kaj faris al si dometon en formo de tubereto. Fininte ĝin, li ekdeziris havi najbarojn. La bacilo estas tre societema kaj malamas solecon. Sola li ne povas detruadi kaj bezonas kamaradojn. Tre rapide li ekhavis idojn. Lia gepatra koro ne estas tre milda, kaj li tuj forigis la idojn, postulante de ili, ke ili same konstruu domojn. Tiel baldaŭ estiĝis tuta vilaĝo en la pulmoj de Marjo. Tiu vilaĝanoj estas terure mangavidaj kaj tuj komencis manĝi la junajn pulmojn de Marjo.

Iun malvarman tagon la kompatinda infano ekhavis febron. Ŝi jam antaŭe tuis, sed nun la tusado pliiĝis. Iun tagon ŝi elkraĉis iom da sango.

- Panjo, panjo, ekkriis Marjo, mi elkraĉis sangan.

- Tio ne estas sango, kara.

- Jes panjo, estas ĝi.

- Ne, vi estas eta kaj ne scias kio estas sango, respondis la patrino.

- Tiel doloras min en la brusto, apenaŭ mi povas spiri, panjo.

La patrino forkondukis Marjon al kuracisto. Li ekzamenis ŝin kaj serioze kapbalancis.

- Malbone, sinjorino, la infano serioze malsaniĝis. Ŝajnas la komenco de tuberkulozo.
- Ho ve, ho ve, mia infaneto. Kion fari nun ?
- Mi donos al vi kuracilon. La infano restu multe en freŝa aero. Malfermu ĉiam la fenestron de la ĉambro.
- Estas vintro, sinjoro kuracisto !
- Tuj kiam iom aperos la suno, portu la infanon ĉe la fenestron.

La patrino foriris kun la infano, tre enpensinte.

La baciloj terure multobliĝadis. La unua bacilo kriis al la aliaj :

- Transiru ankaŭ al la alia pulmo. La juna pulmo estas tre bongusta. Ĉi tie oni vivas bonege kaj ni ĉiuj estos dikaj kaj grasaj. Nur produkti multe da veneno. Per ĝi ni mortigos niajn malamikojn, la blankajn gardistojn.

Tiun krion ekaŭdis blankaj gardistoj, kiuj ĉiam naĝas en niaj vejnoj kaj limfaj glandoj en la tuta korpo. Tiuj blankaj gardistoj estas etaj estaĵoj, kiujn oni nomas blankaj globuletoj, sed ni nomas ilin blankaj gardistoj. Ili estas tre, tre multnombraj en nia sango. Ili havas ankaŭ similajn amikojn, ruĝajn globuletojn, kies tasko estas purigadi sangon kaj alportadi oksigenon, kiu nutras korpajn ĉelojn.

Blankaj gardistoj estas tre rapidaj. Neniu fiŝo povas tiel rapide naĝi kiel ili. Ili vivas en fortikaĵoj en nia sango. Tiuj fortikaĵoj estas limfaj glandoj, kaj ili estas plenaj de blankaj gardistoj. De tie ili eniras la sangon kaj naĝas kiel veraj taĉmentoj tra la vejnoj en la tuta korpo.

Blankaj gardistoj estas bonege armitaj. Ili posedas fortajn saketojn kun longaj lipharoj, kaj same estas armitaj iliaj piedoj. Ilia stomako estas granda kaj la apetito bonega. Ili ŝategas la manĝaĵon, kia estas baciloj.

Aŭdinte bruon kaj kriadon, la blankaj gardistoj ekurĝis el ĉiuj fortikaĵoj al la pulmoj. Tuj ili ĉirkaŭis bacilajn vilaĝojn.

- Kiu alvenis en tiun ĉi kvietan vilaĝon ? - fiere demandis maljuna bacilo, la praavo de ĉiuj baciloj.
- Ho, estas vi, maljuna fripono, - respondis iu blanka gardisto. Kion vi faras ĉi tie ?
- Impertinenta policisto, kian rajton vi havas ĝeni mian vilaĝon, kiu kviete vivas sur la pulmoj de Marjo ?
- Kruelulo, ektondris la blanka gardisto. Ĉu estas honeste, ke vi manĝegas la pulmon de tiu kompatinda knabineto ? Eliru, ke mi formangu vin !
- Stultulo, mi ja scias, kio estas mia. Neniam mi venis en vian fortikaĵon. Mi estas kvietaj kaj honesta vilaĝano. Vi vidas, kiel en mallonga tempo mi multnombrigis mian tribon. Nun mi rajtas ĝui la fruktojn de mia laboro.
- Laboro ! Kaj vin tute ne interesas, ke tiu knabineto ne povas dormi, ke ŝiaj vangetoj paliĝis. Vi manĝegas ŝian sangon kaj karnon, kaj tute tio ne interesas vin.
- Male, mia devo estas nutri mian tribon. Ĉiu devas vivi. Vi neniuloj policaj ekzistas nur por ĝeni kvietajn vilaĝanojn.
- Vi scias, ke al gardistoj ĉiu devas obei. Je la nomo de la leĝo, eliru.
- Vi forpelos nin el niaj kvietaj domoj, vi sangsoifanto. Tiujn ĉi vilaĝojn ni konstruis. Rigardu, ĉi tie jam ekzistas miloj da domoj en la formo de tuberetoj, kaj ĉiu domo estas plena de kuraĝaj baciloj. Ni estas kuraĝa tribo.
- Vi estas kuraĝaj, vi infan- kaj junulmurdistoj. Kiom da patrinaj koroj vi plorigis, kiom da infanoj vi malfeliĉigis murdinte iliajn patrinojn. Kiom da vivoj vi detruis, sed nun alvenis via lasta tago.
- Nu, ni vidu kiu estas pli forta, kolere respondis la maljuna bacilo. Viroj kaj edzoj, junaj kaj maljunaj, en batalvicojn. Ni ĉiuj atakos tiujn impertinentajn blankajn gardistojn. Hura, antaŭen ! For la policon ! For krimulojn !
- En batalvicon, komandis iu blanka gardisto. Neniu rajtas malproksimiĝi. Antaŭen ! Ataku !

- Antaŭen ! - ekkriis de alia flanko baciloj.

Nun okazis vera milito. Blankaj gardistoj kun siaj fortaj membroj kaj malsataj stomakoj atakis tre kuraĝe, sed la baciloj ne retiriĝis.

- Frapu, frapu ! - oni aŭdis de ambaŭ tendaroj.

- Frapu blankajn gardistojn - kriis la maljuna bacilo.

- Frapu tiun maljunan krimulon - kriis blankaj gardistoj.

Kelkaj blankaj gardistoj atakis solidan domon de la maljuna bacilo. Sed ĝi estis bonege armita. Tie ili estis pli multnombraj kaj per la veneno mortigis blankajn gardistojn.

- Venenu blankajn gardistojn, venenu ilin !

- Helpu, helpu, fratoj ! Ĉi tie terure fetoras. Ĉiu tubereto estas unu venenofabriko. Ili venenis nin - mallate veis mortanta blanka gardisto. Al lia vekrio respondis multaj blankaj gardistoj kaj multnombre atakis fortan domon de la maljuna bacilo. Miloĵ da buŝoj malfermiĝis por formangi la maljunan krimulon kaj la batalo estis rapide finita. Baldaŭ malaperis el sia domo la praavo de ĉiuj baciloj.

- Ho, kiel fetoras ĉi tie - plendis blankaj gardistoj. Kiom da veneno ili preparis por ni. Kiom el niaj kamaradoj malaperis en la batalo kontraŭ tiuj senanimaj venenistoj. Preskaŭ ĉiujn el ni ili mortigis.

- Ataku ĉie tiujn fortikajn domojn, - kriis unu blanka gardisto.

- Ne eblas. Ili estas tro rezistaj, plenaj de veneno kaj tre fetoraj.

- Mordu ilin kaj faru truojn en la muroj, ordonis blanka gardisto, kaj milionoj da kuraĝaj kaj malsataj blankaj gardistoj atakis tuberajn bacilajn domojn. La batalo estis terura. Nu, blankaj gardistoj estis pli fortaj, kvankam ili havis multajn perdojn.

Blankaj gardistoj baldaŭ gajnis la militon, se ne alvenus iu kampara virino ĉe la patrino

de Marjo.

- Kio estas al Marjo ? - demandis la maljunulino.
- Malbono, diras la kuracisto.
- Kion scias la kuracisto, diru al mi, ĵe kio ŝi malsanas ?
- La brusto doloras ŝin.
- Prenu la brandon kaj dolĉigu ĝin per mielo.
- Ĉu tio estas bona ?
- Kompreneble, tio refreŝigos ŝin.

Kaj la patrino, volante helpi al la knabino, alportis iom da brando kun mielo. Ĝuste, kiam la blankaj gardistoj preskaŭ finis la militon, ektondris la brando. Baldaŭ disiĝis la venena alkoholo tra la sango, kion la blankaj gardistoj sentis kiel tertremon.

- Kio okazis ? Ĉu tertremo ? Ni ja balanciĝas.
- Ahaha, oni ekaŭdis ridegon de baciloj. Vivu la brando, vivu kamparanaj maljunulinoj. Vi estas ebriaj. Ebriuloj policaj.

Kaj tio estis vera. De tiu brando la blankaj gardistoj malmoraligis. Ili estis ebriaj.

- Ni estas ebriaj kaj ebriuloj ne povas plenumi siajn taskojn. Malbenita brando, kion ĝi faris el nia batalo. Sed atendu, vi murdistoj, ni sobriĝos kaj finmanĝos vin.
- Ĝis tiam ni fabrikos tiom da veneno, ke vi ĉiuj mortos kaj al ni restos liberaj pulmoj.

En tiu momento alvenis la kuracisto kaj tuj rimarkis, ke Marjo trinkis brandon.

- Vi donis al Marjo brandon ? Kiel vi povis esti tiom kruela ?
 - Mi ne estas kruela. Mi amegas mian Marjon kaj la brando plifortigos ŝin.
 - Ne, ne, ŝi eĉ male malplifortigos. Nun ni devas injekti al ŝi iun medikamenton. La kuracisto prenis injektilon kaj enŝprucigis la medikamenton. Tuj, kiam la medikamento atingis la sangon, la blankaj gardistoj komencis sobriĝi. Ili rekomencis la batalon.
 - Nun ni vidu, kie estas vi, "kuraĝaj" baciloj.
- Sentante la medikamenton kontraŭ ili, la baciloj komencis fuĝi diversflanken, sed ĉiujn kaptis

blankaj gardistoj. Ili troviĝis laŭlonge de ĉiuj vejnoj kaj limfaj glandoj, kiel sur la riveroj armitaj fiŝkaptistoj. Kie ajn iu bacilo volis kaŝi sin, li falis en la manojn de blankaj gardistoj. La bataalkampo estis vere terura. Detruitaj tuberaj domoj de baciloj baldaŭ estis purigitaj. Ĉi tie multe helpadis ruĝaj fratoj, kiuj alportadis oksigenon kaj per ĝi purigis tuberojn.

- Alportu nur oksigenon. Ĉi tie fetoras kiel en plej aĉaj staloj. La resto de veneno ankoraŭ terure fetoras. Oksigenon, oksigenon, por purigi la ĉelojn.

- Ni portas ĝin, respondis ruĝaj helpantoj, sed mankas suno.

Eta Marjo estis tre pala, kaj la instruisto konsilis al la gepatroj, ke ili daŭre konsultu la kuraciston. Alveninte en la tria monato, la kuracisto estis kontenta pri la nuna stato. Li apenaŭ kredis al siaj oreloj. La sono de la pulmo estis pli klara, limfaj glandoj estis ankoraŭ ŝvelintaj, sed la stato estis multe pli bona.

- Nu, ĉi tie devis esti terura milito, dum tiuj tri monatoj.

- Kia milito povas esti en la pulmoj, sinjoro kuracisto ?

- Tion vi ne komprenas. Tio estis vera milito inter blankaj gardistoj kaj baciloj.

- Ĉu en la pulmoj estas gardistoj ? - ridis la patrino de Marjo.

- Jes, - respondis la kuracisto. En nia sango vivas veraj blankaj gardistoj, kiuj vojaĝas tra vejnoj en ĉiun angulon de nia korpo. Oni povas diri, ke la vejnoj estas kiel riveroj, kiuj fluas tra la tero. Tiu tero estas nia korpo. Ĉar la tero ne povas esti sen riveroj, same nia korpo ne povas esti sen sangoriveroj kaj glandoj. Sur tiuj riveroj en la fortikaĵoj troviĝas vera armeo, tiuj blankaj gardistoj, kiuj atentigas, ke neniu malamiko ataku nian santon.

- Kaj kiuj estas tiuj malamikoj ?

- Ili estas multnombraj kaj nomiĝas bakterioj. Ni dividas ilin laŭ la formo je baciloj (kio signifas bastoneto), streptokokoj (frago), spiraloj ktp. Ĉiuj el ili kaŭzas iun malsanon. Ili eniras en nian korpon tra la nazo aŭ buŝo.

- Kion ni faru nun kun Marjo ?

- Nun vi iru kun ŝi en la montaron, kie estas pura aero kaj suno. Tie Marjo kuŝos sub la suno. Se vi restus ĉi tie, la malsano povus reveni, ĉar certe ekzistas ankoraŭ ie kaŝitaj baciloj, kiuj rapide povus multobliĝi; speciale se ŝi malvarmumus.

Post kelkaj tagoj Marjo alvenis kun gepatroj en altan montaran vilaĝon kun pura aero kaj montara suno.

Se vi nun aŭdus kriojn. - Alportu oksigenon, kriis blankaj gardistoj.

- Ho, oni havas ĝin multe en tiu pura aero kaj belega suno.

Blankaj gardistoj estis tre atentemaj. Ankoraŭ ili ne trankviliĝis. Iun tagon ili trovis junan bacilon, kiu sukcesis iamaniere kaŝiĝi.

- Kion ci faras ĉi tie, bubaĉo ?

- Kompatu min orfon. Mian tutan tribon vi formanĝis. Ĉu vi ankoraŭ ne estas sataj ?

- Ne, respondis blanka gardisto. Ci estas murdisto, same kiel cia praavo, ciaj gepatroj kaj cia tuta krimula familio. Por la krimuloj ne estas kompatato.

- Sangsoifanto ! Mi kaŝis min en iu tubero, sed tiu diabla oksigeno forpelis min. Nur se ĝi ne ekzistus, ĉio estus en ordo.

- Sed, juna venenisto. Feliĉe ni havas sufiĉe da oksigeno kaj suno, kaj ĉio damaĝas al ci. Por ke ci ne tro suferu, venu ĉi tien ! Kaj blanka gardisto formanĝis ankaŭ la lastan bacilon.

- Je via sano kaj bonan apetiton ! - ekkriis liaj kamaradoj kaj ekridegis.

- Vere bongustis tiu juna rostaĵo. Nun ni formanĝis tiujn bacilojn sed eble venos novaj. Oni devas esti preta. Kaj nun ni rememoru niajn kamaradojn, kiuj falis en tiu terura milito, kiun ni preskaŭ malgajnis.

- Gloron al kuraĝaj viktimoj, kiuj falis en la batalo por la sano kaj feliĉo de nobla homo.

- Gloron al ili - ekkriis la blankaj gardistoj kaj foriris diversflanken. De tiam ili troviĝas en la postenoj, en la sango de Marjo. Eta Marjo estas denove ruĝvanga kiel pomo.

Revenante hejmen, Marjo kaj la patrino ricevis de la kuracisto jenajn konsilojn :

1. Kiam vi tudas aŭ ternas, metu la poŝtukon aŭ maldekstran manon antaŭ la buŝon.
2. Kraĉu nur en la kraĉujon.
3. Nenion metu en la buŝon, krom manĝaĵo aŭ trinkaĵo.
4. Gardu okulojn, nazon kaj buŝon de ciaj aŭ fremdaj fingroj.
5. Ne viŝu vin per fremda viŝtuko kaj ne trinku kun iu alia el sama glaso aŭ botelo !

La panjo de Marjo promesis fari tiel, ĉar tio estas la plej bona maniero sin defendi de ĉiuj malsanoj.

Marjo resaniĝis kaj denove estis ĉarma kaj bela knabineto. Ĉiuj tre amis ŝin kaj speciale ŝia panjo, kiu decidis neniam plu trinki brandon nek doni ĝin al iu ajn infano.

* *
* *

LA BANDITO TIFO

Rakonto pri vilaĝano, kiu infektiĝis per akvo

Estis belega kaj agrabla mateno. Maljuna Magiisto sidis antaŭ la domo kaj denove alvenis al li la infanoj.

- Karaj infanoj, kion signifas, ke vi tiel frue alvenas ĉe mi ?

- Ni alvenis, por peti vin, ke vi plian fojon rakontu iun novan rakonton al ni. - respondis iu ĉarma knabeto.

- Rakonton, kian rakonton ?

- Ankoraŭ iun pri blankaj gardistoj.

Maljuna Magiisto ekkaresis sian longan barbon kaj iom pripensis. Tiam li prenis iun libron.

.. Bone ! Mi trovis unu rakonton. Mi rakontos al vi pri bandito Tifo. Ankaŭ ĝia vera nomo estas tifo. Tio estas eta blanka bacileto. Jen, karaj infanoj, ĉi tie mi montros al vi ĝian bildon. En la granda libro li montris al ili bildon de tifobacilo, kiu tre similas al krabo. Nur li havas multe da senordaj, barbecaj gamboj.

- Tio estas Tifo, la bandito Tifo ! - diris la maljuna Magiisto.

- Ho, kiel ĝi estas malbela !

- Ĉiu bandito havas longajn kaj malbelajn lipharojn, kaj tiel ankaŭ Tifo.

- Sed kiun li murdis ?

- Li mortigis multajn homojn. Li havas ankaŭ sian banditan familion. Unuj el ili nomigas disenteriojn (ili estas malpli dangeŝraj), kaj la aliaj estas vere teruraj, manĝegemaj kaj kruelaj, ke ili ne ŝparas eĉ tutajn vilaĝojn kaj ŝtatojn. Tio estas plej teruraj banditaj baciloj, la holeruloj.

- Ho, ĉu ankaŭ en nian vilaĝon alvenos tiuj teruraj banditoj ?

- Ne timu - ili ne alvenos en nian vilaĝon, se vi

LA T I F O - B A N D I T O



estos obeemaj, kaj bone aŭskultos ĉi tiun rakonton, kiu diros al vi, kiel defendi vin kontraŭ tiuj banditoj.

- Rakontu do, bona Magiisto.

- Jes, mi rakontos al vi pri la bandito Tifo. Simile al li vivas kaj disvastiĝas ankaŭ liaj parencoj, Disenteriulo kaj Ĥolerulo.

La infanoj eksidiĝis ĉirkaŭ li kaj la maljunulo komencis :

- En la korto de iu vilaĝano staris granda amaso de sterko. En tia sterko vivas diversaj bakterioj, bonaj kaj malbonaj, kaj ofte tie vivas ankaŭ la bandito Tifo. Pro sia eteco li facile per la akvo ĉien alvenas. Tifo ne ŝatas sunon. Ĝuste, ĉe tiu vilaĝano, la sterkejo troviĝis en la ombro de granda nuks-arbo. Ĉiuj bakterioj estis kvietaj kaj bonkoraj, nur Tifo estis tre vigla. Li kvazaŭ enuis, pro longa atendado. Dum la tago li kaŝis sin sub iu folio en la flako, kaj vespere eliris eksteren kriante :

- Ho, kiel mi enuas. Mi tute ne ŝatas tiun frenezan sunon. Kial ĝi tiom brilas ?

- Por ke ni povu multobliĝi, - respondis la bakterioj, kiuj ne eltenas sunon sed multobliĝas en varmo.

- Kial vi devus multobliĝi ?

- Ĉar, alveninte en la teron, ni plibonigos ĝin kaj la kamparano povos produkti multe da tritiko kaj li havos bonegan panon.

- Mi malestimas vin - koleris Tifo. Kial havi panon, kial sterki la grundon ? Tion faros la kamparano, kiam mi sendos lin en la tombon.

- Tirano, ĉu vi tiel parolas pri kamparano, kiu tiel peze laboras kaj ŝvitas de la laboro super la grundo ?

- Jes, akre respondis la bandito Tifo. Jam de ok tagoj mi atendas ĉi tie kaj ne povas trovi puran akvon. Mi ŝatus, ke iu per akvo entrinku min kaj tiam mi povos sufoki lin. Mi ne povas vivi, ne venenante. Se mi ĉi tie ellasas miajn venenojn, nenia utilo el tio. Sed kiam mi elĵetas ilin en la sangon de iu senatenta vilaĝano, mi estas en

plena formo. Tion mi ŝategas.

- Sed cin persekutis blankaj gardistoj, kaj ci kuris antaŭ ili.

- Ankaŭ ili kuris antaŭ mi. Ne ĉiam ili estas pli fortaj ol mi. Finfine, la rajton al batalo havas ĉiu bandito.

- Tio estas alia afero. Sed la rajto estis pli granda ĉe la gardistoj.

- Kompreneble, ke ĉiam venkas tiu, kiu estas pli forta. Kiam mi estas pli forta, mi mokas ĉiujn gardistajn rajtojn.

- Ci estas tre impertinenta. Apenaŭ ni povas elteni cian ĉeeston ĉi tie. Se almenaŭ aperus de ie iu sunradio kaj bruligus cin.

- Kiu sub la alia fosas la truon, li mem falas en ĝin. Vi estas multe pli nombraj kaj ne povas kaŝiĝi sub la folieto. Dum la tuta tago mi aŭskultas, kiel vi veas sub la sunradioj. Kaj tamen vi laŭdas sunon kaj vilaĝanon. Vi kriaĉas kiel frenezuloj, sed tio tute ne helpas. Tio estas malnova rakonto, ke tiujn, kiuj cedas kaj noble agas, tamen iun tagon iu bruligos.

- Tamen, estus terura malfeliĉo, se iun tagon malaperus la nobleco.

- Laŭ mia opinio, ne estus tiel malbone. Ja, jam plurfoje noblaj homoj finis sian vivon sur la rubajamaso. Ili fariĝis almozuloj. Sed tion oni ne povas diri pri bandito. Pro tio mi murdas ĉie, kie mi povas, kaj mi kaŝiĝas ĉi tie, antaŭ tiu abomena sunlumo.

Tiel disputis la bakterioj kun Tifo, Fine li decidis ĉesigi la konversacion kaj kaŝi sin sub la folieto. Tie li restis ĝis la nokto, kiam aperis la luno. Tiam li eliris por vidi, kia estos la vetero kaj ĉu baldaŭ pluvos. De pluvo li atendis la savon. Li nepre volis foriri de ĉi tie, sed ne sciis kiamaniere. Nur la pluvo povis helpi al li. Pro tio li serĉis la lunradion por demandi ĝin, kion pensas la nuboj. Elirinte, tuj li ekridis kaj salutis la lunradion :

- Bonan vesperon, kara amiko ! Senpacience mi hodiaŭ atendis vin. Hodiaŭ mi preskaŭ akcidentiĝis.

- Kiamaniere ?

- Pro iu stultá anaso. Ĝi serĉadis ion per la beko sub mia folieto kaj volis eltiri min al la suno. Kvankam mi kriis al ĝi, ke ĝi ne faru tion, ĉar la sunon mi ne eltenas, ĝi tute indiferentis. Kun malfacilo mi kaŝiĝis ĉe iu dorno. La anaso sekvis min, sed la dorno pikis ĝian langon, kaj tiam ĝi forkuris.

- Sed kial ci ŝatas min, bandito ? Normale min ne ŝatas banditoj, ĉar mi lumigas la nokton.

- Pri aliaj banditoj mi ne zorgas. Ni ne ĉiuj estas membroj de iu bandita organizo, kaj do ni ne devas zorgi unu pri la alia. Mi ŝatas, ke vi estas tiel malvarma. Vi ne povas bruligi min, kiel tiu sovaĝa sunradio. Ĝi amase bruligas nin sur la stratoj, kiam ni troviĝas en la strato-pulvo. Nur kelkaj el ni sukcesas kaŝi sin sub la ventro de iu muŝo, rato, muso aŭ iu el similaj bonfarantoj kaj savi sin. Sed ili ne ĉie troviĝas, kaj malmultaj el ni sukcesas elsaviĝi.

- Sed, se ne estus tiel, en la mondo ne plu estus vivantaj homoj.

- Al mi tio estas egala. Mi bezonas vivantan homon por veneni lian sangon, ĉar en ĝi mi multobliĝas kaj evoluas. Efektive, post mia eniro en homan korpon tuj atakas min blankaj gardistoj, sed bandito Tifo rapide multobliĝas. Mi rapide dronnaĝas en la sango kaj produktas etajn Tifetojn. Multe da veneno ni ĵetas kontraŭ blankajn gardistojn. Kiel la homoj estas strangaj. Kiam ili faris militon, ili volis veneni unu la alian, sed ne bone komprenis tion. Ili devus de ni lerni, kiel oni ĵetas la venenon. Mi estas pli lerta majstro.

- Sed blankaj gardistoj estas same lertaj.

- Jes, sed ili ne povas mem produkti la venenon, sed nur batali per siaj membroj kaj buŝo. Kaj mi elĵetas amason da veneno kaj duonon el la militoj mi gajnas. Plej facila batalo estas en la infanaj korpoj kaj en la korpoj de ebriuloj kaj malsanuloj. Preskaŭ ĉiam mi gajnas ilin.

- Mi tute ne ŝatas, ke ci tiel estimas min. Mi

tre ŝatas infanojn. Dum ili dormas, mi rigardas ilin tra la fenestro kaj ĝojas pro ilia sana kaj dolĉa dormo. Vere mi suferas, vidante tra la fenestro la suferantan patrinon apud malsana infano.

- Kaj min tiam vi ne vidas, ne povas atingi min. Sed kreu, kara lunradio, ankaŭ mi havas problemojn. Min tiel persekutas kaj manĝas blankaj gardistoj, ke eĉ oni ne povas priskribi tion. Neniam la homoj tiel terure interbatalas. Sed ion mi demandus vin. Vi alvenas de granda malproksimo, kaj diru, ĉu vi ie vidis la pluvnubon?

- Ne, nenie mi vidis ĝin. Min la nubo mortigas. Ĝi rompas min kaj mi perdiĝas en ĉielvasteco. Formanĝas min nigra mallumo.

- Ĝi estas mia bona amiko. Ĝi ellasas la pluvon, farigas riveretojn kaj tiamaniere mi ekfluas. Ankoraŭ kelkajn tagojn kaj la varmo sekigos tiun ĉi flakon, kaj mi povus morti.

Eta nubeto trapasis la ĉielon kaj la lunradio malaperis.

Tifo estis tre malbonhumora. Kien ajn li turnis sin, neniu toleris lin. Li cerbumadis, kiamaniere li forirus de ĉi tie. Fine li decidis lasi ĉion al hazardo.

Frue matene ekpluvegis. Post momento la korto estis plena de marĉetoj kaj flaketoj. El la sterkajo ekflugis la sterkakvo tra la korto al la strato. Ankaŭ la flaketo, en kiu estis Tifo, pleniĝis de akvo kaj li sentis, ke la akvo levas lin.

- Mi leviĝas jam frue matene. Ho, dormemuloj, ĉu vi aŭdas min, - kriis li al la bakterioj.

Nu, malvarma pluvo ne plaĉis al la bakterioj kaj ili silentis.

- Adiaŭ ! Mi foriras kaj vi serĉu la varmon.

- Vi tute ne devis alveni. - respondis la bakterioj.

- Tiel malagrablan kaj malbone edukitan societeton mi forlasas kun kolero. Kun malestimo mi forlasas vin.

- Iru, nur iru, bandito Tifo !

- Mi ne permesas, ke oni insultu min. Fine, ĉiu vivo havas sian celon. Tio estas mia metio. Laŭ

metio mi estas bandito Tifo, kaj pro tio mi fieras. Vi fekundigas la teron.

- Ne primoku nin tiel malice.

- Adiaŭ. Mi jam vojaĝas. La akvo transportis lin en pli grandan rivereton, kiu fluas en la direkto de la proksima rivero. Ankoraŭ ne tute tagiĝis, kaj la bandito Tifo jam plenrapide, sen pagita vojaĝbileto, vojaĝis sur la rivero. La akvo fluegis kaj tio donis la esperon al Tifo, ke ĝi alportos lin en la proksimon de iu bona kaptajo, al iu malatenta homo.

Baldaŭ la pluvo ĉesis kaj la rapideco estis malpli granda. La rivereto ne plu havis tiom da akvo, kaj tion sentis ankaŭ Tifo. Subite li rimarkis du siajn parencojn, kiuj ankaŭ alvenis tien de iu balaaĵejo.

- Bonan matenon ! - kun ĝojo salutis Tifo siajn fratojn, la Disenteriulon kaj Ĥolerulon.

- Ĉi tien, por ke oni ĉirkaŭbraku unu la alian - ekkriis ankaŭ tiuj banditoj.

Tifo algluiĝis al iu fetora ŝaŭmoparto kaj ĉirkaŭbrakis ilin.

- De kie vi ĉi tie, fratoj miaj ?

- Estis vere terure al ni. Jam ni kredis morti, kiam min savis iu rato, diris la ĥolerulo.

- Kaj min elsavis iu muŝo. La suno mortigis ĉiujn disenteriulojn, krom nin kelkajn. Mi gluiĝis al la stomako de iu muŝo, de tie mi falis en la akvon, kaj nun mi estas ĉi tie.

- Kaj tiu maljuna rato malbone finiĝis. Per vivo ĝi pagis mian elsaviĝon. Ĝi fuĝis tra diversaj kanaloj kaj portis min. Sed subite alvenis la akvo kaj ĝi dronis, kaj la akvo min alportis ĉi tien.

- Nu, karaj miaj, mi jam timis, ke la suno mortigos min, sed la pluvo savis min kaj la akvo alportis min ĉi tien. Nun ni estas kune.

- Vere estas agrable tiel komune vojaĝi. Oni povas amuziĝi.

- Jes, tamen ni ne tro saltadu, ĉar mi tre malsatas. Mi tre dezirus iom da sango.

- Certe ni trovos ĝin. La homoj ĉiam urĝegas,

kaj estas plenaj de zorgoj pri la aliaj aferoj, ne havante tempon por pensi pri propra sano. Foje alvenos iu, kiu nin kun la akvo trinkos. Tiam ni eniros en larĝajn kaj ruĝajn kanalojn de homaj vejnoj. Tie bonodoras. La sango estas tiel dolĉa.

- Kaj vi ne pensas pri blankaj gardistoj ? - demandis disenteriulo.

- Kio estas por mi la blankaj gardistoj ? - diris la ĥolerulo. Miaj venenoj estas tiel fortaj, ke mi preskaŭ ĉiam gajnas en la batalo kun ili.

- Vere mi enias al vi - diris Tifo. Vi vere estas la plej forta el ni ĉiuj. Kun tio oni ne povas ŝerci. Pro tio mi tiel estimas vin kaj sentas min tre honorita en via ĉeesto.

La ĥolerulo fieregis pro tiuj vortoj.

- Tamen mi estas tre malsata. Imagu, karaj miaj, diris Disenteriulo, jam delonge mi ne gustumis sangan. Neniam mi alvenis al ĝusta loko. Se mi povus veni ien inter la fragoj, kaj ke iu formangu min kun ili.

- Mi estas plena de veneno, ke mi sola povus mortigi milionojn da blankaj gardistoj. Ni kune povus multon fari.

Tiel alvenis ili en iun ebenajon, en la herbojn. La ŝaŭmo rompiĝis en du partojn kaj Tifo foriris en alian flankon.

- Adiaŭ, fratoj, la sorto destinis al mi la alian vojon.

- Kien portos min tiu ĉi akvo ? - demandis sin Tifo.

Subite li sentis, ke li falas. Efektive li falis en etan kamparan puton. Fine li restis sur la akvo en la puto.

Apude falĉadis la herbon iu kamparano. La vetero post la pluvo estis agrabla, kaj li diligente laboris. Je tagmezo li sidigis sub la pirarbo apud la puteto kaj komencis tagmanĝi. Ĉio bongustis al li. Post la manĝo li prenis akvon el la puto per iu glaso.

- Ha, kiel la akvo rapide puriĝis, nun ĝi estas pura kaj bongusta.

- Tion vi nur pensas - pensis Tifo - sed mi zorgos por veni en la glason.

La kamparano denove prenis akvon, ĝuste en la loko, kie estis Tifo.

- Ankoraŭ momenton - pensis Tifo - kaj mi atingos la celon. Nur mi devas atenti, ke la lipharoj ne baru al mi vojon.

Sed la kamparano unue rapide viŝis la buŝon kaj lipharojn kaj tiam rapide englutis la akvon.

- Mi estas ĉi tie, ekkriis ĝoje Tifo.

La kamparano, post la tagmanĝo, kuŝigis sin sub la pirarbo kaj ekdormis.

Dekkvar tagojn poste li eksentis kapdoloron. La febro kreskis kaj li devis enlitiĝi. La kapdoloro estis pli kaj pli forta.

Liaj edzino kaj infanoj ektimis kaj demandis lin, pri kia malsano temas. Unue li ne volis diri, sed post pluraj sinsekvaj petoj li cedis kaj malkovris sian "sekreton".

- La feinoj atakis min.

- Ho ve, ekkriis la edzino. Tio ne estas kuracebla!

- Jes, dum mi falĉis herbon kaj tagmanĝis, mi ekdormis sub la pirarbo. Dum la sonĝo mi sentis, ke la feino estas sur la arbo. Poste alvenis la aliaj feinoj kaj ekdancis la rondodancon. Mi neintence frapis unu el ili per la piedo. Tiam ili atakis min kaj pugnobatadis. Apenaŭ mi elsaviĝis. Nun jen la rezultato.

- Ho, Dio helpu ! Ĉu mi voku paroĥestron ? Eble li helpos.

- Do, voku lin.

Post momento alvenis la paroĥestro. Li rigardis la malsanulon. Kiam oni klarigis pri kio temas, li metis la brevieron en la poŝon kaj diris:

- Ne estu stultaj. Tio povus esti tifo aŭ iu alia malsano. Voku la kuraciston.

Li foriris kaj la kamparanino vokis la kuraciston. La kuracisto demandis detalojn pri ĉio, kio okazis, kaj post multe da peno li eksciis, ke la kamparano trinkis akvon el la kampa puteto.

- Vi trinkante englutis la tifo-bacilon. Se vi

havas sanan kaj rezisteman sangon kaj koron, vi resaniĝos. La kuracisto entreprenis ĉion por la kuracado. La unuaj ok tagoj estis plej danĝeraj. Tiam la blankaj gardistoj bataladis en malespera milito. La bandito Tifo plimultiĝis dum tiuj du semajnoj kaj produktis tiom da veneno, ke aperis febro kaj la kamparano devis enlitiĝi. La blankaj gardistoj batalis kun pli-malpli granda sukceso.

Post tri semajnoj ili povis pli libere spiri.

- Ankoraŭ restas multaj Tifoj kaj Tifetoj.

- Jes, ni estas ankoraŭ multaj.

- Sed, kiam ni formaniĝos vin ĉiujn, neniam plu vi povos malbonfari. La kontakto kun via veneno tiom fortigis nin, ke de nun ni ĉiam venkos vin. Ni estas pli kaj pli fortaj kaj vi estas konstante malpli multnombraj.

- Estu damnitaj ! - ekkriis maljuna Tifo. Se mi nur alvenus kun mia frato holerulo, ĉio estus aliel. Tifo parolis tion, ĵetante la venenon. Sed la blankaj gardistoj atakis kaj formaniĝis lin.

- Nun estas cia fino, ci krimulo.

De tiu tago la kamparano fartis pli kaj pli bone. La sesan tagon li rekomencis manĝi.

- Nun vi rekaptos la fortojn, diris la kuracisto. Aŭskultu, kion mi diros al vi. Vi kamparanoj eraras, ĉar vi ne atentis, kiel vi trinkas kaj manĝas. Jen kelkaj konsiloj :

Ĉiam manĝu per manĝilaro. Poste lavu ĝin per varma akvo. Deŝeligu kaj lavu la fruktojn, ĉar sur ili estas ĉiam multe da bakterioj kaj baciloj.

Ne trinku akvon el riveroj, marĉoj kaj dubindaj putoj. Dubindan akvon kuiru kaj poste trinku.

Dum la konversacio ne spiru alies nazon.

Lavu la manojn antaŭ kaj post la manĝo.

Ekstermadu muŝojn, kulojn kaj aliajn fibestetojn, ĉar ili plej ofte dissemas la malsanojn.

Post la malsano la vilaĝano foriris iom al la maro. Blankaj gardistoj estis tre ĝojaj, ĉar ili tiel fortiĝis en la batalo kun bandito Tifo kaj liaj idoj, ke ili restis por ĉiam nevenkeblaj.

Tion oni nomas imuneco. Kiu iam travivis tifon, neniam poste li povas malsani pro ĝi. Jen, infanetoj, faru tiel kaj ne timu la banditon Tifo.

* * *

FRAGASPEKTAJ INVADISTOJ

Rakonto pri la invadoj en nian korpon

Fariĝis malvarme. Ofte pluvas. La arboj perdis la foliojn kaj la ĉielo estas ofte nuba. Homoj sopiras al suno, sed ĝi ne aperas.

Inter la homoj regas malvarmumigo, speciale inter la infanoj. Iu terura malsano atakis la infanojn. Oni nomas ĝin skarlatino. Pri tio aŭdis ankaŭ la infanoj, kaj venis por demandi la maljunan Magiiston, pri kio temas, kaj kio torturas la infanojn.

La maljuna Magiisto sidis en sia varma kaj pura ĉambro, kaj tre ekĝojis vidante la infanojn.

- Denove vi venis, vi etaj scivolemuloj. Do bonvenon al ĉiuj.
- Ni alvenis por peti vin, nia kara maljuna amiko, ke vi klarigu al ni, kio estas skarlatino.
- Ho jes, tre volonte. Bonvolu sidigi, kaj mi ĉion klarigos.

La maljunulo prenis grandan libron kaj montris al la infanoj iun bildon.

- Antaŭe mi montris al vi la ftizo-bacilon, kiu estas rekta kiel bastoneto. Kaj vidu, tiu ĉi estas ronda kiel frago. Ĉar li estas vivanta estaĵo kaj ĉar li invadas, ni nomu lin fragaspekta invadisto. La kuracistoj nomas lin streptokoko, sed por vi tio ne estas grava.

- Sed kie li invadas? - demandis iu ruĝvanga knabeto.

- Atendu, ĉion vi aŭdos!

- Kiun li atakas? - demandis iu eta knabo.

- Ĉion mi diros, nur paciencu iomete. Por ke vi povu ĉion kompreni, mi rakontos al vi rakonton pri bona kaj ĉarma knabo Jurica.

- Ĉu Jurica iris al lernejo ?

- Jes, li iris al lernejo kaj estis bona lernanto.

- Rakontu al ni, kara Magiisto - petis iu eta knabineto.

- Nur ke mi ankoraŭ ion diru pri tiuj fragaspektaj invadistoj, kiujn mi montris sur la bildo. Ili multobligas kiel plantoj, per dividiĝo. Ili multobligas tre rapide kaj en grandaj kvantoj, ke oni ne povas eĉ imagi la nombron. Krome ili estas tre mangavidaj. Sed, nun aŭskultu !

Foje estis gepatroj kun tri infanoj, du knabinoj kaj knabo Jurica. La fratinoj nomiĝis Katica kaj Anica. La gepatroj amegis sian etan Jurica. Li estis bonkora knabeto, sed iom tro dorlotita. La patrino ĉion permesis al li. La vetero estis tiam tre malbela, kiel hodiaŭ.

Eta Jurica forkuris el la domo kaj iris en ĝardenon. Kurante kaj saltante li tre varmiĝis. Tiel varma li trinkis la akvon kaj iom malvarmumiĝis. Li tusadis. Lia onklino havis malsanan infanon. Jurica vizitis ŝin la proksiman tagon. Ĝuste tiam lia malsana kuzino trinkis citronasukon, kion volis trinki ankaŭ Jurica. Li prenis la saman glason kaj trinkis. La knabineto havis skarlatinon. Sur la glaso restis multaj fragaspektaj invadistoj. Ili silentis, ĝis ili eniris la ĝordon kaj haltis sur delikata mukozo de iu glando, nomita tonsilo, kaj kiun popolo nomas raneto. Tuj ili fariĝis impertinentaj.

- Raneto, donu al ni mangajon !

- Mi ne havas - respondis la raneto (tonsilo).

- Kial vi tiel ŝmiris vin, kiel ciganino dum granda kermeso ? He, vi estas tre ruza. Vi pensas, ke ni algluiĝos kaj restos ĉi tie.

- Tiel estus ĝuste. Mi ne estas raneto kaj mi malpermesas, ke vi moku min. Mi estas la unua defendo-baro kontraŭ vi kaj ĉiuj aliaj invadistoj, kiuj atakas noblan homon. Finfine, mi ne longe okupiĝos pri vi. Tuj vi forflugos eksteren. Ne tiklu min, ĉar ankoraŭ pli rapide vi estos elĵet-

itaj eksteren.

- Ŝajnas al ni, ke sub tiu bela rozkolora ĉielo, aŭ kiel via amata homo nomas ĝin palato, vi vivas kiel balaejo. Komprenoble, ni estas por tiel nobela moŝto kiel vi, nur balaaĵo.

- Vi decidis kolekti nin sur mia ŝmiraĵo kaj poste elĵeti nin kun la salivo aŭ iu likvaĵo por buŝlavado. Tio estas vere malica.

- Ĝuste tiel ! Eĉ mi fieras pro tio. Mia konscienco ne permesus, ke mi vivu, kaj ne estu utila al homo, la reganto de ĉio nobla.

- Ankaŭ de malnoblo. Ne pensu tro bone pri tiu via homo. Li estas ankaŭ tre granda egoisto. Li mortigas bestojn, detruas arbarojn kaj elĉerpigas grundon.

- Vi mensogas, mensogas ! Li prizorgas arbarojn, prilaboras grundon, defendas la bestojn. Sed li estas malamiko al malamiko, do ankaŭ al vi.

- Ankaŭ ni estas malamikoj al li, vi abomena ranaĉo.

Dum ili tiel disputis, la invadistoj ekscitis la delikatan mukozon de raneto, ke eta Jurica ektusis. El la buŝo li elĵetis grandan pecon da muko.

- Rano, ne elĵetu nin eksteren !

- For ! Eksteren ! - koleris la raneto.

La patrino de Jurica rimarkis, ke la knabo tudas.

- Kio estas al vi, fileto mia ?

- Nenio, panjo, mi estas sana.

- Ĉu vi malvarmumis ?

- Ne, mi estas sana. Mi iras ludi.

La knabo elkuris en freŝan aeron. Longe li restis ekstere, sed post la reveno li estis melankolia kaj raŭkvoĉa.

Vespere li enlitigis, sed estis maltrankvila la tutan nokton. Li havis terurajn sonĝojn. Dum li tiel dormis, la fragaspektaj invadistoj ne estis trankvilaj.

- Nun vi kraĉu, dum vi dormas ! - kriis la invadistoj.

- For, for de mia ĉemizeto, vi aĉuloj !
 - Ne, ni ne iras. Eĉ ni multobligas. Eĉ ni komencis tiel mordi vin, ke vi pufiĝis kiel vera marĉa rano. Nur vi ŝvelu kaj vi krevos, kiel indas al iu stultaĉa rano.

La fragaspektaj invadistoj daŭrigis ekscitadi, t.e. grati la mukozon, ke ĝi efektive ŝvelis. Dum la nokto ili tiel multobligis, ke jam matene de ekstere oni rimarkis la rezultojn de ilia laboro.

- La rano - parolis la invadistoj - donu al ni por manĝi, aŭ ni per gratado devigos vin krevi. Tiam estos malfermita al ni la vojo al sango. Ĝin ni manĝegus. Ĉu vi komprenas ?

- Mi komprenas, sed mi tion ne permesos tiel longe dum mi havos iom da forto en mi.

- Ni ataku ankoraŭ pli ! Ankoraŭ pli forte !

Matene la knabo ektusegis.

La patrino rigardis lin kaj ekkriis :

- La kolo de nia Jurica tre forte ŝvelis. Venu ĉi tien, ŝi vokis sian edzon.

La patro alvenis, palpis la kolon kaj konstatis ŝvelon.

- Filo mia, kio doloras vin ?

- Mia gorgo.

La patro tuj vokis la kuraciston.

- Tiu via homo jam kriaĉas. Do, li estas "kuraĝulo". Li pafas per kanonoj, flugas super la oceanoj, dresas leonojn, kaj jen li ektimis pro niaj etaj ŝvelaĵoj. Kiel estas malkuraĝa tiu via homo,

- parolis la fragaspektaj invadistoj.

- Li ne estas malkuraĝa. Nur li estas saĝa kaj defendas sin de la malbono.

- Rigardu nun tiun vian rozkoloran "ĉielon". Ĝi jam estas tre ruĝa, kaj pli kaj pli malhela.


Baldaŭ ĝi estos malhele ruĝa kaj tio estas nur nia merito.

- Tamen ne tro ĝoju pro tio. Ankaŭ ni havas armilojn kontraŭ tio.

La fragaspektaj invadistoj ekridegis.

- Ho, ci stultaĉa rano, ci pensas, ke ni ne havas armilojn. Ci estas tiel stulta, ke ci eĉ ne vidas

FRAGASPEKTAJ
INVADISTOJ



sur ci mem. Ja, ni estas granda fabriko kaj laboristoj, kiuj produktas venenon. Ni estas kemiistoj kaj produktas tiom da veneno, ke ni ne devas timi homon. Ranaĉo, ankaŭ sur cin ni ĵetis la venenon, kaj pro ĝi ci estas nun tiel abomene pufa kaj ŝvelinta.

- Sed mi estas tre fortika. Mia ĉemizeto estas bonege farita kaj ĝi ne timas viajn venenojn. Vana estas via ĝojo.

En tiu momento alvenis la kuracisto. Tuj li palpis la kolon de Jurica kaj konstatis ŝvelaĵojn.

- Tio ne estas tre danĝera. Ĉu la knabo tusas ?
 - Jes, li tusas tre forte, sinjoro kuracisto.
 - Bonvolu doni al mi etan kuleron !

La patrino de Jurica alportis kulereton. La kuracisto ekrigardis la buŝon kaj gorgon de la malsana knabo. Dufoje li rigardis, kvazaŭ li ne kredus al siaj okuloj.

- La glandoj ŝvelis. Temas verŝajne pri angino.
 - Ĉu oni povas morti pro tio ? - demandis timeme la patrino de Jurica.
 - Ne, tute ne, sed povas okazi komplikajoj. Ni vidos post du aŭ tri tagoj.

La kuracisto preskribis medikamentojn kaj specialan likvaĵon por gargari. Li ankaŭ ordonis doni al li fomentojn. La knabo gargaris, sed tamen konstante plendis pro doloroj. La fragaspektaj invadistoj koleris pro tia konduto de Jurica. Dum li gargaris, milionoj el ili estis mortigitaj kaj elĵetitaj eksteren.

- Tiu bubaĉo mortigos nin ĉiujn. Ni devos pli kaj pli multobliĝi kaj tiam pli bone ni povos batali kontraŭ la knabo kaj kontraŭ tiu stulta ranaĉo.

- Vi ne venkos. Nun ni estas pli fortaj. Vi ĉiuj mortos. For, eksteren ! - kriis la raneto.
 - Ranaĉo, ci antaŭvidas por ni la morton. Tuj ni atakos cin, ke pro niaj venenoj ci krevos. Antaŭen, fratoj, ni triobligu la laboron. Samtempe ni multobliĝu kaj niaj idoj tuj agu.

Ĵetu la venenojn !

- Tiel, brave, tiel oni devas labori. Vivu cent jaröjn nia gvidanto.

La invadistoj atakis tre forte. La knabo gargaris. Sed dum li dormis nokte, ili profitis kaj sukcesis ĝis mateno trabori la delikatan ĉemizeton de la kompatinda raneto.

- Jen, ranaĉo. Nun ni gajnis, kaj ci provu defendi cian homon kun tiu traborita ĉemizo. Unua defendmuro falis. Nun manĝegu. Ni malsatas kaj avidas sangon.

- Antaŭen al tagmanĝo ! Ho, kiel bongustas manĝaĵo post tiom peza laboro - kriis la junaj invadistoj.

- Estas vero, miaj infanoj - parolis iu maljuna invadisto. La infanoj sen manĝaĵo devas morti kaj ĉiu viva estaĵo povas vivi nur, se ĝi havas idojn.

Matene alvenis la kuracisto, ekzamenis la knabon kaj mezuris lian temperaturon.

- La temperaturo grimpas. Donu al mi ankoraŭ unu kulereton.

La patrino tuj alportis ĝin. Eta Jurica, kiu dum la malsano estis ankoraŭ pli dorlotita, ne volis malfermi la buŝon.

- Mi ne volas, tio dolorigas min.

- Jes, tio iom dolorigas. Sed mi devas rigardi profunde en la gorgon. Malfermu forte la buŝon.

La knabo faris tion ne tre bonvole, sed tamen faris. Same vi devas ĉiam obei, kiam la kuracisto tion postulas de vi. La kuracisto rigardis la gorgon.

- Ha, kara sinjorino. La palato estas malhelruĝa. Tio ne estas bona signo. Montru nun la langon !

- Jen, jen - diris la kuracisto. Vidu sinjorino, lia lango estas plena de fragformaj makuloj.

- Ho ve, ho ve - ploris la patrino. Kion mi faru nun ?

- Oni ne devas malesperi. Nun ni kuracos lin. Tiu febro tiel longe-daŭra montras, ke li verŝajne havas skarlatinon.

- Mia Dio! - esploris la patrino. Ankaŭ la patro klinis la kapon. Ilia infano estas grave malsana.

Proksiman tagon la temperaturo estis ankoraŭ pli alta. Ĝi grimpis ĝis kvardek gradoj, kio estas jam tre grava.

- Ĉu multe ploris lia panjo? - demandis iu knabineto.

- Jes, ŝi multe ploris, sed la kuracisto konsolis ŝin.

La fragaspektaj invadistoj, post la farita truo en la ĉemizeto de raneto, alvenis ĝis alia glando pere de limfaj kapilaroj, kiuj havas rilatojn kun niaj sangaj vejnoj, kiujn oni vidas eĉ sur niaj manoj. La kuracisto tion rimarkis pro ŝveloj, kiuj aperis sur la kolo. Sed la cirkulado tra limfaj glandoj ne estas facila. Nome, la kanaloj limfaj estas bone gardataj pere de blankaj gardistoj, kies fortikaĵoj tie troviĝas.

- Haltu! - eĉ ne paŝon antaŭen! Kiuj vi estas? De kie vi venas?

- Ni estas fragaspektaj invadistoj. Post la venko ni alvenas por tagmanĝi. Ni terure malsatas.

- For de ĉi tie. Returnen.

- Ni interkonsentu kaj preparolu ĉiom.

- Nenia interkonsento eblas.

- Ni lasos vin pace kaj helpos vin kontraŭ viaj malamikoj. Ĉiujn viktimojn ni donos al vi por manĝi. Ĉu vi akceptas?

- Ne, ni ne akceptas. Ni ne estas vulturoj. Ni manĝas nur vivantajn estaĵojn. Honesta armeo ne disfalas pro friponeco sed pro malvenko. Returnen! Aŭ ni etendos la mortigajn tukojn!

- Tukojn? La rano volis glui nin sur sia balaĵejo kaj nun vi timigas nin per tukoj. Ni estas tre malsataj. Lasu nin manĝi! Finfine, kiuj vi estas?

- Ni estas blankaj gardistoj. Ni estas blanka armeo, kiu gardas kaj defendas homan korpon. Multfoje jam ni venkis tiajn krimulojn, kiaj

vi estas.

- Sufiĉas! Ni ataku! Terure ni malsatas!

Blankaj gardistoj donis la signalon. El ĉiuj proksimaj fortikaĵoj alvenis forte armitaj taĉmentoj.

- Nun ni vidos - ekkriis la blankaj gardistoj.

La invadistoj ĵetis siajn venenojn, sed tion ne timis blankaj gardistoj. Milionojn da invadistoj ili envolvis en siajn tukojn kaj formangis. - Ha, kiel bongustas tiuj junuloj. Tio estas vera dolĉaĵo por mia maljuna barbo.

Sed en tiu momento alvenis la veneno de invadistoj kaj la maljuna soldato falis kun miloj el liaj kuraĝaj kamaradoj.

- Jen, kiom valoras cia tuko! Nun ci povas envolvi cin kaj dormi eternan sonĝon - mokis la fragaspektaj invadistoj.

Tiu ĉi batalo daŭris tutan nokton kaj tagon. Tion bone rimarkis la kuracisto la proksiman tagon.

- La febro ne ĉesas. Bone kovru vin. Devas nepre aperi ruĝaj makuloj sur la korpo.

Tio efektive okazis proksiman tagon. La invadistoj venkis la unuajn barojn kaj eniris la sango. Tiel ili alvenis ĝis lieno, kie estas la centra bazo de blankaj gardistoj. Tie ili estas la plej fortaj.

Tie la invadistojn atendis plej granda armeo de blankaj soldatoj, kaj okazis la decida batalo. Iuj fremdaj fortoj, kiujn blankaj gardistoj ne konis, helpis al ili. Ili ĵetadis kontraŭvenenon, kiu tuj aperas en la sango, kiam la veneno alvenas.

Proksiman tagon la kuracisto estis tre kontenta. - Sinjorino! Estas bona signo, ĉar la ruĝaj makuloj aperis.

Nun li konstatis skarlatinon kaj povis preskribi la kuracilojn.

La knabo nun estis ekster mortdangero, sed tamen li multe suferis. Tio daŭris ses semajnojn.

Tiam li komencis perdi la skvamojn. La sano iom post iom revenadis.

Iun tagon, kiam la raneto denove havis belan ĉemizeton kaj la ĉielo estis denove rozkolora, alvenis novaj invadistoj. Sed la raneto ekridis al ili :

- Vi ne plu eniros la sangon. Tio ne povas okazi dufoje.

Kaj fakte, Jurica forigis ilin ĉiujn per tusado kaj buŝlavado. El tiu multeco de venenoj, kiujn produktis la invadistoj, restis ankoraŭ io bona. La raneto kaj la glandoj fariĝis multe pli fortaj kaj ne plu devis timi pro fragaspektaj invadistoj. Jurica tute resaniĝis, reiris al la lernejo kaj daŭre restis bona lernanto.

Kaj kion faris la kuracisto, dum la knabo malsanis ? Li ordonis la vakcinadon de sanaj kamparanoj per kontraŭskarlatina vakcino. Oni nomas tion profilakso, kio signifas la defendon de sanaj personoj. La kuracado de Jurica nomiĝas terapia kuracado, kio signifas la kuracadon de malsanuloj.

Per kio la kuracisto kuracis lin ?

Per la sama vakcino, per kiu oni vakcinas sanajn personojn.

El kio konsistas tiu vakcino ?

Ĝi konsistas el mortaj fragaspektaj invadistoj aŭ el iliaj venenoj (toksoj).

Kial oni vakcinas sanajn homojn ?

Por ke ili fariĝu imunaj kontraŭ la nova invado de tiuj invadistoj. Kiam iu estis vakcinita aŭ resaniĝis de skarlatino, ne povas facile remalsaniĝi.

Nun mi donos al vi ankoraŭ kelkajn konsilojn:

- Lavu regule dentojn kaj buŝon. Ne iru en la domon, kie estas iu malsanulo, ĉar povus temi pri infektmalsano kaj ankaŭ vi povus infektiĝi.

La infanoj dankis, adiaŭinte maljunan Magiston kaj promesis sekvi liajn konsilojn.

DUKAPAJ LEDISTOJ

Rakonto pri la milito en infana gorgo.

La infanoj alvenis ĉe maljuna Magiisto kaj petis lin, ke li rakontu al ili pri terura malsano, de kiu multaj infanoj malsanas kaj eĉ mortas. La maljunulo malfermis sian libron kaj montris al ili bildon de bastoneto kun du kapetoj, ambaŭflanke de la korpo.

- Similan bastoneton mi jam montris al vi, kiam ni parolis pri blankaj gardistoj. Tiu eta bastoneto estas viva estaĵo kaj tre venena. Tio estas bacilo, kiu kaŭzas gorgan malsanon aŭ difterion. Ni nomos ĝin dukapulo. Nun mi rakontos pri iu gaja knabeto nomita Gojko. Li estis kvarjara knabo. Liaj gepatroj posedis vinberejon. Foje la patrino alkondukis lin tien, okaze de la vinberrikolto. Gojko kuris kaj saltis gaje kun sia pli aĝa fratino Zorka. Ilia vinberkulturisto havis knabinon, kiu havis gorgmalsanon. Ŝi tro frue forlasis la liton kaj ludis kun Gojko kaj Zorka. Ili manĝis la vinberojn kune. Malsana knabineto per fingroj transportis el sia buŝo kelkajn dukapulojn sur la vinberojn. Eta Gojko formanĝis ilin kaj subite ili troviĝis sur lia lango. Tuj rimarkis ilin ambaŭ ranetoj (tonsiloj). Ili vidis la dukapulojn, kiuj per salivo alproksimiĝis. La ranetoj bone konis ilin kaj sciis kiel rapide ili multobliĝas. Pro tio ili tuj ekkriis :

- Ni ellasu la mukon. Alvenas dukapuloj. Ili estas gravaj malamikoj.

Ambaŭ ranetoj bone ŝmiris sin kaj la dukapuloj gluiĝis sur ilia tre delikata ĉemizeto.

- Kia impertinentaĵo! Apenaŭ ni alvenis kaj vi gluis nin sur tiu via ĉemizo. Ni tamen provos nin liberigi.

- Vi ne sukcesos !

- En kian societon vi alkondukis nin ? Rigardu tiujn naivajn estaĵojn, kiel ili tremas pro timo. Malkuraĝuloj !

- Ni boné konas vin! Vi estas tre akraj kaj tre aĉaj malamikoj. Fakte la plej aĉaj el ĉiuj, kontraŭ kiuj ni batalas - diris unu el ranetoj.

- Ŝajnas al ni, ke vi kaptas nin kiel senfeligisto hundojn. Vi estas ankoraŭ pli krudaj kaj vi gluis nian tutan korpon sur tiu via aĉa, grasa kaj malseka ĉemizo. Nur kiel malpura vi estas raneto ! Nenio sur vi estas konvena. Vi estas plena da balaaĵo ! - kaj tiam li turnis sin kontraŭ grupo da etaj estaĵoj, kiuj estis same gluitaj sur la korpo de la raneto, kaj ekkriis :

- Kial vi tiel ektimis ? Parolu !

- Ni timas ranetojn. Ili estas tiel danĝeraj. Ili gluigis nin ĉi tien kaj ni havas nenion por manĝi. Ni devos ĉiuj malsatmorti.

- Ne timu! Foje aperos io, kio helpos nin. Tiam ni plenumos nian devon.

Eta Gojko multe kuris, kaj tute varma, ekŝidis sur malvarman grundon.

Vespere estis malvarme, kaj blovis malvarma vento. Eta Gojko iom raŭkiĝis.

- Vidu raneto, ci iom ŝvelis kaj tio estas tre bona por ni - provokis ilin la dukapuloj. Kva-zaŭ pro kolero la ranetoj moviĝis kaj eta Gojko ektusis. Sed la dukapuloj estis forte gluitaj kaj per tusado oni ne povis elĵeti ilin.

- Tiun ĉi fojon ci faris al ni servon. Pro troa ŝmiriĝo, ni estas bone fiksitaj kaj oni ne povas elĵeti nin per salivo. Vere ci estas "saĝa" ! - mokis unu dukapulo.

Dumnokte eta Gojko ekhavis altan febron. La temperaturo konstante kreskis. Matene la knabo estis tre varma. La patrino fariĝis tre malĝoja kaj maltrankvila. Lia fratino Zorka foriris en vinberejon kaj eta Gojko restis en la lito. Li havis dolorojn en la gorgo. Tiel pasis ankoraŭ unu tago kaj li fartis tre malbone.

Dukapuloj komencis agadi, dum la ranetoj ŝvelis.
 - Nun ni serĉos ĉiujn mortintajn ĉelojn kaj kolektos ilin. Al laboro, fratoj! - ekkriis plej maljuna dukapulo.

Sur la ranetoj estis multaj mortaj ĉeloj. Dukapuloj rapide multobligadis kaj baldaŭ estis kelkaj milionoj da batalantoj.

- Nun, ni alivestos la ranetojn. Baldaŭ vi havos belan blankan ledan ĉemizon !

- Ne turmentu min. Mi sufokiĝos sub via leda ĉemizo.

- Tio ne gravas por ni. Vi sufokiĝu !

Malicaj dukapuloj premis la ranetojn kaj ĉie serĉis la mortintajn ĉelojn.

- Nur alportu tiujn multajn ĉelojn kaj bone aranĝu ilin unu apud la alia. Inter ili ni metos fibrojn kaj tiamaniere fariĝos tre solida ledo.

- Jes, ni faros ! - kriis junaj dukapuloj.

Milionoj da dukapuloj eklaboris. Tio estis fabriko, kun kiu oni ne povas kompari iun ajn alian. Neniu havas tiom da laboristoj, kapablaj kaj labor-emaj, kiom estis sur la delikata ĉemizo de la kompatindaj ranetoj.

- Ho raneto ! Ni jam preskaŭ tute alivestis cin. Tiel bela ci estas en tiu blanka leda ĉemizo. Ni ankoraŭ alportos novajn mortintajn ĉelojn. Diru sincere, ĉu ci iam povis imagi, ke el tiuj kadavroj kaj fibroj oni povas fabriki tiel solidan ledon ?

- Ne, tute ne - ĝemis la raneto.

Kiel veraj torturistoj ili daŭrigis sian aĉan laboron. Proksiman matenon alvenis la patrino ĉe eta Gojko.

- Kie vi havas dolorojn, Gojko ?

- En la gorĝo; mi malfacile spiras.

La patrino paliĝis. En tiu dezerta regiono, kie troviĝas nur vinberejoj kaj arbaroj, ne estis kuracisto nek iu, kiu povus helpi al la kompatinda infano.

La vinberrikolto estis finita kaj la patrino

DUKAPAJ LEDISTOJ



de Gojko ordonis, ke oni revenu hejmen. La kochero jungis la ĉevalojn kaj ili ekiris per montara vojo al malproksima vilaĝo. La malsana knabo kuŝis en patrino sino.

Gojko fartis tre malbone, kvazaŭ li estus en iu nebulo. Kun alta febro li tre malfacile spiris.

- Ĉu ankoraŭ doloras vin, Gojko ? - demandis la patrino.

- Jes, mi ne povas spiri.

La infano malfermis la okulojn. Ili baldaŭ proksimiĝis al la urbeto, en kiu estis kuracisto kaj eta hospitalo. La vojo al la vilaĝo pasis tra tiu urbeto.

Dukapuloj jam tute alivestis la raneton. Nenion plu oni povis vidi kaj la ranetoj tute ne povis moviĝi. Profunde sub rigida ledo ĝemadis la ranetoj.

- Tiu ĉi ledon ni tiel bone finteksis, ke ranetoj nur ĝemas sub ĝi. Alifojke ili estos pli saĝaj. Sed ankoraŭ ne ĉio estas alivestita. Kial tiu epigloto restus ruĝa ? Ankaŭ ĝi devas esti blanka. Ĉio devas esti blanka, kaj tiam ni malpermesos al aero eniri en la pulmon.

- Tio estus bonega. Tiam sukceson ni ne havis ĉe la filino de vinkulturisto. Tiu knabineto rapide nin forigis, sed tiu etulo tre taŭgas por nia laboro. Li estas ankoraŭ tre eta kaj ne scias bone tusi.

Malicaj dukapuloj tiom reproduktiĝis, ke la tuta gorgo estis plena da ili. Per siaj venenoj ili mortigadis la ĉelojn kaj tuj portis ilin sur la epigloton.

- Atendu ĉi ruĝa pordisto. Ĉi devas blankiĝi - parolis la dukapuloj.

- Ne, mi ne rajtas blankiĝi. Mi ne rajtas dikigi, ĉar tiam la aero ne povos eniri la pulmon kaj eta Gojko sufokiĝos.

- Kaj ĝuste tion ni volas, ke la aero ne povu eniri. Foje ni provos la batalon ankaŭ kontraŭ tiu potenca gaso. Ni vidu, ĉu ni povas malhelpi al li eniron !

- Ne estu tiel kruelaj! Ĉu vi ne aŭdas, kiel ploras la patrino de Gojko? Ĉu vi ne sentas, kiel ŝia koro krevas pro doloro?

- Ha, ha, ha! - tiaj aferoj tute ne kortuŝas nin. Nia devo estas mortigi, kaj se ni sukcesis, ni atingis nian celon.

Milionoj da laboristoj tiradis la ĉel-kadavrojn kaj fibrojn. Ĝiaj kadavroj malrapide grimpis sur la grandan pinton de la epigloto. Por tiu laboro oni bezonis multe da forto.

- Tiru ilin ĉi tien! - kriis maljuna dukapulo.

- Ni ne povas, ni estas tro malfortaj kaj tio estas tro alta kaj kruta. Tiel granda estas tiu pinto de epigloto!

- Helpon! Venu la aliaj! Venu tutaj armeoj, por ke ni havu finan sukceson. Je la ordono de la maljunulo alvenis novaj grupoj kaj alportis ĉelokadavrojn sur la pinton de la epigloto.

- Mi ne povas spiri, panjo! Mi sufokiĝas! - Ĝemis eta Gojko.

La patrino sentis doloron ĉe la koro.

- Tuj ni alvenos en la urbon. Rapidu, koĉero.

La koĉero frapis la ĉevalojn kaj ili ekkuris al la urbo. Dukapaj torturistoj tute alivestis la epigloton kaj nun komencis la palaton.

- Vi estas bela rozkolora ĉielo, sed ankaŭ vi devas nubigi. Ĉu vi vidas tiun blankan ledon? Per ĝi ni vestos vin. Vi aspektos tute nebulece.

- Ne faru tion, ĉar la aero ne povos eniri kaj trapasi.

- Kia aero? Ni ja volas, ke ĝi ne povu trapasi.

- Panjo, mi ne povas spiri - diris eta Gojko.

Mi sufokiĝas.

Dukapuloj denove eklaboris kaj baldaŭ ankaŭ la palato estis alivestita per blanka ledo.

La ĉaro eniris en la urbeton kaj la patrino ordonis, ke ili haltu antaŭ la hospitalo. Tuj ili malsupreniris kaj venis antaŭ la kuracisto.

- Pri kió temas? - demandis la kuracisto.

- Jam trian tagon li plendas pro gorgdoloro.

- Jam trian tagon! - ekmiris la kuracisto. Tio

povus esti jam tro malfrue.

La patrino ekstremis. La kuracisto malfermis la buŝon de Gojko kaj enmetis la kuleron.

- Krupo !

- Kio ? - demandis la patrino.

- Krupo, sinjorino ! Tio estas la stato de diferio plej danĝera kaj plej malfacile kuracebla. Mi faros ĉion laŭ miaj ebloj, sed mi povas nenion promesi. La knabo estas tute infektita. Se vi ne alvenus, post kelkaj horoj, li verŝajne mortus.

La patrino ekploris. Ŝiaj larmoj fluis sur la vizaĝon de la knabeto, kiu batalis por kapti ion da aero.

- La infano devas resti ĉi tie. - ordonis la kuracisto. En tiu momento alvenis flegistino kaj transprenis la infanon de la patrino.

- Sinjorino ! Mi devas tuj fari ĉion necesan por savi la infanon. Vi bonvolu atendi ĉi tie proksimume unu horon. Tiam ni vidos.

Oni forkondukis etan Gojkon en apartan ĉambron por infektaj malsanoj.

- Fratino (flegistino), bonvolu alporti necesajn instrumentojn kaj voku ankoraŭ du flegistinojn!

Post kelkaj minutoj ĉio estis preta. La kuracisto bonege lavis siajn manojn kaj aliris la malsanuleton. Unue li anestezis la haŭton sub la adampomo kaj malfermis la gorgon inter du traĥeoringoj. En ĝin li enmetis iun tubon. Nun Gojko povis spiri artefarite.

- Tiu spiras, kvankam ni jam tiom fermis la gorgon, ke li ne plu povis spiri. Ni vidu kio okazis! - ekmiris la maljuna dukapulo. Tuj li surgrimpis la pinton de la lango por vidi profunde en la gorgon.

- Li havas tubon en la traĥeo! Tio ja tamen estas tro !

La kuracisto tuj prenis la vakcinon kaj injektis ĝin al Gojko. Tiam li revenis al lia patrino kaj diris, ke eble la kuracado sukcesos,

kaj ke ŝi iru hejmen.

Kelkajn horojn poste, okazis terura milito. Blankaj gardistoj kun helpo de vakcino atakis el ĉiuj fortikaĵoj.

La knabo devis ankaŭ gargari, sed ĉar li estis tre malgranda kaj juna, li ne ankoraŭ sciis tion fari. Sed, kun la insistado de flegistinoj, la etulo fine ellernis tion fari. Dum ĉiu gargarado, estis elĵetitaj milionoj da mortigitaj dukapuloj eksteren.

- Tiu stultulo mortigos nin ĉiujn. Jen la palato jam denove estas ruĝa. Ĝi skrapis nian ledon.

- Estas vero. Unu triono el ni jam estas morta kaj naĝas en la lavejo en tiu abomena lizo.

Post kelkaj tagoj ankaŭ la epigloto estis liberigita. Restis ankoraŭ nur ranetoj alivestitaj.

- Ho, ĉu neniu liberigos nin? Ĉu neniu forigos tiun aĉan ledan ĉemizon?

La knabo regule lavadis la buŝon kaj gorgon. Kiam la kuracisto vidis, ke la epigloto kaj palato estas denove liberaj, li forigis la tubon.

- Mi povas spiri! Kie estas panjo? - demandis Gojko.

- Ŝi venos kaj forkondukos vin hejmen.

Post kelkaj tagoj ankaŭ la ranetoj estis liberaj.

- Do, ankaŭ ni nun estas liberaj. Kie vi estas, la dukapuloj?

Anonciĝis nur unu timema voĉo.

- Ho, kiel vi fariĝis modestaj! Vi ne plu povos alivesti min kaj sur mia haŭto fabriki vian uniformon.

- Vi povas nur primoki nin. Sed kie ni kaŝiĝu, ni la restoj de iam granda armeo?

- Tien, kie ankaŭ la aliaj foriris.

Nova alveno de lav-akvo verŝiĝis sur la ranetojn.

- Tio refreŝigas nin, ekkriis la ranetoj.

- Ne dronigu nin. Ni ne estas fiŝoj kaj ni ne

scias naĝi. Kompaton al ni, ni petas.

- Ha, ha, ha - ridis la ranetoj. Vi ne plu estas tion impertinentaj kaj kuraĝaj.

Eta Gojko lasis akvon en la lavujon kaj la dukapuloj trovis sin en lizo, kiu tuj mortigis ilin. Tiel post kelkaj tagoj malaperis eĉ la lasta dukapulo.

La patrino de Gojko alvenis por forporti sian fileton. Ĉe la adiaŭo la kuracisto konsilis al ŝi :

- Antaŭ ĉio la pureco, sinjorino ! Nur la pureco povas malhelpi tian teruran malsanon. Instruu al la infanoj gargari kaj regule lavi la buŝon kaj gorgon.

- Dankegon, sinjoro kuracisto ! Mi mem tion faras, sed mia vinberkulturisto ne sciis tion.

- Ĝuste la vinberkulturiston, laboriston, kamparanojn kaj tiel plu oni devas instrui pri la pureco, - diris la kuracisto.

La feliĉa patrino prenis sian etan knabeton kaj forportis lin hejmen. Nun la fratino Zorica denove povis ludi kun sia frateto.

* *
*

LENTUGA SANGSUĈANTO

Rakonto pri iu petolema kulo.

Maljuna Magiisto estis sola en sia ĉambreto. Longe li rigardis iun ordinaran kaj etan estaĵon. Li rigardis ĝin de ĉiuj flankoj, la piedojn, palpilojn, kapon. Kaj tiam li decidis distranĉi ĝin. Per tre delikata kaj eta tranĉileto li malfermis ĝian abdomenon kaj eltiris stomakon. Ĝin li metis sub la lupeon. Ankaŭ ĝian internon li esploris.

La maljunulo tute ne rimarkis, ke intertempe eniris la ĉambron infanoj. Ili rigardis kion faras la maljunulo, sed ili nenion komprenis.

- Bona Magiisto, ĉu vi koleras kontraŭ ni ?

La maljunulo ekridetis kaj diris :

- Ne, karaj infanoj. Mi eĉ ĝojas, ke vi alvenis. Jam delonge mi ne vidis vin.

- Sed kio estas tio ? - demandis la infanoj.

- Tio estas kulo. Ĝus mi finis la esploron de tiu sangsuĉanto. Ĝi nomiĝas Anofelo. Tio estas nur ino. Ŝin estas facile rekoni. Jen rigardu. Ĝi tie sur la flugilo troviĝas kvin lentugoj. Ŝi havas longajn gambojn, pli longajn ol ŝia korpo, sed speciale interesa estas ŝia kapo. Sur ĝi ŝi havas okulojn kaj inter ili pintajn palpilojn. Tie sube troviĝas du lakunoj, inter kiuj troviĝas unu suĉilo. Ĝi konsistas el ses tre delikataj kaj pintaj pikiloj. Per ĝi ŝi serĉas mangaĵon.

Jen, nun vi konas tiun interesan kulon de ekstere. Tiu Anofelo dormas dumtage, kaj kiam ĝi dormas, ĝi tenas sian kapon vertikale. Laŭ tio oni facile rekonas ĝin, ĉar ĉiuj aliaj kuloj

dormas kun kliniĝinta kapo. La ordinaraj kuloj ne havas lentugojn sur la flugiloj kaj la palpiloj de la ino estas tre mallongaj. Tio estas ordinara kulo, kiu povas piki homon kaj ne estas danĝera. Ĝi nomiĝas Kulekso.

- Mi vidis en nia stalo tian lentugan kulon - diris iu knabineto.

- Kaj mi trovis ĝin sub la lito - aldonis iu knabo.

- Mia panjo purigante kamereton trovis multe da tiaj kuloj en malhela angulo, malantaŭ la kurteno. Per la balailo ŝi mortigis ilin.

- Bonege, geknaboj ! Vi ĉion tre bone rimarkis. Tiel ĝi vivas sub la litoj, en malhelaj anguloj, en staloj, sub seĝoj. Ĝi estas terura. Vera sangsuĉanto.

- Ĉu vi konas iun rakonton pri ĝi ?

- Jes, mi scias. Mi rakontos al vi pri tio, kion ĝi faris en iu vilaĝo apud iu marĉo. Mi rakontos ĉion, de ĝia naskiĝo ĝis la morto.

La infanoj sidiĝis ĉirkaŭ la maljunulo kaj li komencis rakonti :

- En iu vilaĝo de Slavonio, proksime de rivero Drava, estis grandega marĉo. Apud la marĉo estis tre gaje, speciale dum somero. Multaj diversaj birdoj flugis super la marĉo. En la akvo dum la tuta tago kvakadis ranoj kaj dikaj nigraj marĉaj karpoj inerte naĝis tra ĝi. Dikaj plantoj, karikoj, junkoj, nimfeoj kreskis ĉie en la marĉo. La kamparanoj ne havis ian ajn utilon de tiu marĉo, kaj ties aero fetoris pro putraĵoj el la marĉo. Ĉiuj bestoj kaj plantoj ĉi tie vivis en bona amikeco. Kiel veraj loĝantoj en iu kolonio, ili vivis veran familian vivon. Nu, vespere, kiam la suno jam estis en okcidento, estis neeble aliri la marĉon. Vespere alvenis amaso da kuloj el tiuj humidaj plantoj kaj marĉetoj. Okazis tia zumbado de tiuj lentuguloj, ke ne eblis resti en ilia proksimeco.

En unu tia kulosvarmo troviĝas kelkaj miloj da tiaj muzikistoj. Tio estas ĉefe junuloj,

maskloj dezirantaj edziĝi. Sed ĉe ili ne estas kutimo, kiel ĉe homoj, ke viro serĉas virinon, sed male virino serĉas viron. Tion la maskloj atendas. Pro tio ili estas tiel ekscititaj, gajaj kaj kantemaj.

Tiel kantante, ili vokas la inojn, sed la virinoj hezitas. Ili alvenas al la svarmo kaj denove foriras.

- Neniu plaĉas al mi !

- Ĉu nek mi, nek mi ?

- Nek vi nek iu ajn. Ĉiuj vi estas iel malsataj kaj tro maldikaj.

- Ĉu ankaŭ mi - ekkantis iu fortika kulo, granda kaj bela. La sunradioj lumigis liajn lentugojn sur la flugiloj.

- Vin ankaŭ la suno amas - respondis ĝentile la junulino. Vi estas bela kaj fortika, viaj lentugoj estas tiel brilaj kaj travideblaj.

- Ankaŭ la niaj estas tiaj - ekkriis kelkaj el la virkuloj.

- Flanken ! Ne ĝenu la konversacion. Lasu min, ke ni interkonatiĝu - kriis la elektita feliĉulo.

La junedzo serĉis la vojon ĝis la kandidatino.

- Nun mi estas ĉi tie. Rigardu min !

Tiuj du gejunuloj gaje ekdancis en la aero. Nun la aliaj en la svarmo rapide gajigis kaj komenciĝis komuna kantado kaj dancado. Oni ĝojis pro la feliĉo de la novaj geedzoj. Ĉiuj gratulis al ili kaj ekdeziris multe da feliĉaj tagoj.

- Estu feliĉaj ! Bonan vojaĝon, jungeedzoj !

- Dankon, ridetis la juna edzino.

La juna edzo tiel ĉarme muzikis, ke ĉies koro estis feliĉa.

La kulosvarmo forflugis aliflanken, kaj la juna paro haltis en la plantoj de iu marĉeto.


- Ĉi tie ni tranoktos - proponis la edzo.

- Bonege. Mi estas tre laca. Multajn svarmojn mi vizitis por trovi vin. Vi estis la plej bela.

- Mi vere fieras pro tio. Ne estis facile venki ĉiujn aliajn en kiu konkuro.

L E N T U G A

S A N G S U C A N T O



La nokto estis belega, ĉielo plena da steloj kaj en la kvietaj marĉakvo oni vidis ridetantan lunon. La ranoj kvakadis, la kuloj zumadis. Sed la junaj geedzoj ne plu pensis pri siaj parencoj. Eĉ ili deziris, ke neniu ĝenu ilin.

Malfrue vespere alvenis du vilaĝanoj por paŝti la ĉevalojn. Ili ligis la ĉevalojn kaj ĝuis la belegan nokton. Unu el ili nomigis Franjo kaj alia Petro. Ili estis junaj viroj.

- Kial vi tiel kurbigis ? - demandis Franjo al Petro.

- Mi havas febron, kiu mortigas min. Hodiaŭ mi havis tiel fortan febron, ke ŝajnis al mi, kvazaŭ mia kapo krevos pro temperaturo. Tio estas grava febro, kiun oni nomas malario.

- Malario ! Sed de kie tiu febro en nia vilaĝo ?

- De kie ? Jen de tiu ĉi marĉo. Dimanĉon mi estis en la urbo. Mi vidis, ke la homoj iras en kinejon, kaj ĉar estis senpage, ankaŭ mi iris. Tie estis iu sinjoro, kiu rakontis, pro kio ekzistas malario en nia regiono.

- Kiu estis tiu sinjoro ?

- La distrikta kuracisto.

- Ĵe Dio, kiel stulta vi estas. Se la kuracisto sciis kuraci la malarion, ĝi ne plu ekzistis.

- Li ja scias kuraci la malarion. Sur la ekrano tie li montris multajn bildojn, kaj antaŭ ĉio la kulon, kiu disvastigas la febron.

- Kulon ! - ekmiris Franjo kaj ekridegis. Nu, se ankaŭ vi ekmalsanos de malario, certe vi ŝanĝos la opinion pri kuracisto kaj pri malario.

- Mi ne povas ekhavi malarion. Mi ne timas kulojn.

Kia estas tiu kulo ?

- Tio estas speciala kulo kun lentugoj sur la flugiloj, kaj ĝi tenas la kapon vertikale. Nur la inoj disvastigas la malarion. Tiu kulo nomigas Anofelo.

- Ino kaj tiel malica !

- Ŝi ne estas malica. Ŝi ne faras tion intence. Sed, kiam ŝi sučas la sango de malari-malsana homo, ŝi kunportas kun si lian sango.

- Kaj kion ŝi faras per tiu sango ?

- Ŝi faras nenion, sed la sango laboras. En la sango de malaria homo vivas iu eta estaĵo.

- Ho, Petro, vi fariĝis iu instruita persono.

Kiel vi ĉion memoris ?

- Kiel mi ne memorus, kiam mi ĉion vidis, sur la ekrano ? La kuracisto montris al ni, kiel la homa sango fluas en la vejnoj. Li diris, ke en la sango troviĝas duspecaj korpecoj, blankaj kaj ruĝaj. La blankaj formangas ĉiujn bakteriojn kaj bacilojn, kiuj alvenas en nian sango diversmaniere, kaj pro tio li nomis ilin blankaj gardistoj. En la ruĝajn eniras tiuj etaj estaĵoj, kiuj kaŭzas la febron.

- Kiamaniere ili eniras la ruĝajn globetojn ?

- Ĉion al ni montris la kuracisto. La ruĝaj globetoj estas tiel etaj, ke oni ne povas vidi ilin per normalaj okuloj. Sed sur la ekrano li faris ilin grandaj kiel bulko kaj mi ĉion bone vidis, kaj komprenis.

Kiam la Anofelo-ino pikas iun malarian homon, ŝi sučas lian sango. Ŝi bezonas tiun sango por surverŝi siajn ovetojn, en la stomako. Sen tiu, la ovetoj ne povas esti elkovitaj. Pro tio la ino speciale atakas, kiam ŝi enhavas la ovetojn. La parazitoj el malaria sango restas en la stomako de Anofelo-ino dum du semajnoj. Tie ili kopulacias kaj alvenas en la salivon de Anofelo-ino. Kiam ŝi post du semajnoj pikas iun sanan personon, ŝi samtempe enŝprucigas en lian sango la paraziton, kiu kaŭzas la malarion. Tuj la parazito eniras ruĝan globeton. Tie li rapide multobliĝas kaj eniras aliajn ruĝajn globetojn.

- Sed, ĉu tio povas malbonefiki al homo, se la februlo eniras ruĝajn globetojn ?

- Dum ili ne estas multnombraj, tio tute ne ĝenas. Sed kiam ili multobliĝis, subite ili krevas.

En tiu momento la homo skuiĝas pro febro. Se la homo ne kuracas sin, li devas fine morti pro detruitaj ruĝaj globetoj.

- Mi tute ne povas kredi tion.

- Dio ne donu, ke vi mem spertu tion. Mi konas tiun malsanon.

La kamparanoj ankoraŭ iom babilis. Tiam ili etendis siajn mantelojn kaj kuŝiĝis. Post kelkaj momentoj ili ekdormis.

- Mi aŭdas ronkadojn + diris kulino.

- Ĉu vi malsatas ?

- Jes, mi malsatas. Mi iros piki iun el tiuj vilaĝanoj.

- Ĉu vi baldaŭ revenos ?

- Al tiu demando la juna edzo ne ricevis respon- don. Ŝi gaje ekflugis kaj descendis sur la piedon de Petro. Profunde ŝi pikis lin kaj suĉis lian malarian sangon. La piko ne ĝenis la endormiĝintan homon kaj ŝi trinkis tute trankvile. Fintrinkinte, ŝi ekflugis gaje en belegan nokton. Tion rimarkis la juna edzo.

- Kien vi flugas ? Revenu, mia kara edzineto ! - vokis ŝin la edzo.

- Neniam plu. Mi ne plu bezonas vin. Nun mi estas libera. Adiaŭ !

Tiu bela kaj forta kulo ekflugis, sed eksentis malforton en la tuta korpo.

- Atendu vi perfida ino - ĉu vi vere forlasis min ?

Tion ne plu aŭdis la ino, kiu gaje forflugis en la nokton. La kompatinda kulo falis melankolie. Li estis tre malĝoja kaj ne plu vivkapabla. Ne plu li havis forton por flugi kaj nutri sin. La fortojn li perdis kaj la fakto, ke la edzino forlasis lin, mortigas lin.

- Tiel mi amegis ŝin. Ŝi ŝajnis al mi tiel bona, kaj mi kredis esti feliĉa kun ŝi. Kaj nun ŝi forlasis min. Ho, se mi almenaŭ povus vidi miajn infanojn !

Tiel la kulo ĉagreniĝis, sed la ino tute ne pensis pri la edzo, kiu mortas pro tiu malfeliĉo.

Matene li jam tute perdis siajn fortojn, kaj unu sunradio ankoraŭ lastfoje iom varmigis lin.

- Dankon, varma sunradio. Mi elĉerpis mian vivo-
forton kaj mi mortas tiel sola kaj forlasita.

Amara estas la sorto de tiel sindonema edzo.

Tio estis la lastaj vortoj de la kompatinda kulo. Post kelkaj momentoj li estis morta.

La suno baldaŭ vekis la kamparanojn. Ili kaptis la ĉevalojn kaj rajdante revenis en la vilaĝon. Revenante ili pasis apud la marĉo.

- Rigardu, Franjo, tiun marĉegon. Ĉu ne estas domaĝe, ke tiel granda surfaco de taro restas neutiligebla? Ĉi tie naskiĝas tiuj kuloj, kiuj disvastigas la malarion. De tiu marĉo oni havas nenian utilon. Tiun marĉon oni devas sekigi kaj tiam ni havos multe da bona tritiko, pano, vian-
do kaj lakto.

- Tio estas bona ideo, mia Petro, sed kie trovi monon?

- Oni devas unuigi. Ĝis ni ne sekigos ĝin kaj aliajn marĉojn en tiu regiono, neniam ni estos sanaj. Speciale ni estas malsanaj dum somero, ĝuste kiam ni havas multon por fari. Ankaŭ niaj infanoj mortas kaj suferas de malario. Post la sekigo de marĉoj, ni estos sanaj kaj pli riĉaj.

- Ni ne havas monon. Kaj tion oni ne povas fari sen mono.

- Ni trovos bankon, kiu pruntos al ni monon. Post la fino de laboro la tero redonos al ni monon por pagi la krediton.

Tiel parolante ili revenis en la vilaĝon.

La Anofelino matene ankaŭ alvenis proksime de la vilaĝo. Tie ŝi restis en iu nezorgita konstruaĵo kaj atendis la vesperon. Vespere ŝi denove ekflugis. Renkontinte junajn kulojn, ŝi mokis ilin.

- Kial vi tiom kantas. Mi ne plu bezonas vin.


- Kial vi ne plu bezonas nin?

- Simple pro tio, ĉar mi nun estas libera!

- Kaj kie estas nia bela amiko, via edzo?

- Mi tute ne scias. Tio ne interesas min. Nun mi havas aliajn zorgojn.

F O S I S T O J



- Kiajn zorgojn vi havas ?

- Gravajn zorgojn ! Post kelkaj semajnoj mi naskos ovojn, kaj mi devas trovi por ili taŭgan lokon. Nun mi devas trinki multe da sango.

- Do, for de ni, ankaŭ ni ne bezonas vin.

- Sed tamen mi volas vidi iomete vian gajan dancan. Nur kantu kaj dancu ĝis edziĝo.

- Kaj kiam ni edziĝos ?

- Tiam vi mortos. Vi pagas la edzec-feliĉon per via vivo. Kun rido ŝi ekflugis, serĉante novan viktimon, kie ŝi trinkos la sangon. Post du semajnoj ŝi renkontis Franjon, kiu dormis en fojnejo. Ŝi pikis lin, trinkis la sangon kaj poste sata forflugis en la nokton.

Tiun nokton ŝi sentis, ke la ovetoj estas maturaj. Tiam ŝi deponis ilin sur la akvon en la marĉo, kie la sunradioj povos varmigi ilin. Sed, post la ovonasko, ŝi sekvis la sorton de sia edzo. Ankaŭ ŝi mortis. Ŝiaj ovetoj pufigis kaj post tri tagoj naskiĝis larvoj. Post kelkaj tagoj el ili naskiĝis etaj kuletoj. Unu el ili, vidante la akvon kaj larĝan ĉielon super la kapo, ekkriis :

- Mi, tiel malforta, devas jam zorgi pri mi mem. Mi ne havas gepatrojn ! Vere mi envas la anasetojn, kiuj gaje naĝas sur la akvo kun la patrino.

Tiam li streĉis siajn fortojn kaj la unuan fojon ekflugis en la mondon.

Dum tio okazis en la marĉo, la februloj en la sango de Franjo tiom multobliĝis, ke li baldaŭ eksentis tre fortan febron. Vane la blankaj gardistoj atakadis ilin. La februloj konstante eniradis la ruĝajn globetojn, ke nur etan kvanton oni povis malebligi.

- Mi mortos, diris Franjo, kiam Petro vizitis lin.

- Ne, vi ne mortos ! Jen al vi tiu blanka pulvoro. Tio estas kinino. Ĝi certe venkas la parazitojn. Sed mi certas, ke nun ankaŭ vi farigis malamiko de tiu ĉi marĉo.

- Kompreneble, sed kion ni faru por malaperigi

ĝin ?

Tiuj du kamparanoj komencis propagandi en la vilaĝo por malaperigo de tiu ĉi marĉo.

- Kiel longe ni permesos, ke tiuj kuloj kaj la marĉo mortigas nin ? Ĉu ne estus pli saĝe, ke ni sekigu ĝin, kaj ke en ĝi ni produktu tritikon anstataŭ malarion ? - tiel ili parolis dum ĉiu vilaĝa kunveno.

- Kaj la fiŝoj ?

- Eĉ tiuj fiŝoj ne estas bonaj, ĉar ili vivas en malsaniga kaj fetora akvo.

Kelkajn tagojn poste alvenis en la vilaĝon inĝenieroj, kiuj mezuris la marĉon kaj komencis laboron de elsekigado. Ĝis tio ne estis finita, la vilaĝanoj defendis sin per fumo, kiu mortigis la kulojn. Kiam la marĉo estis tute seka, malaperis el tiu regiono malario. La marĉo, kiu naskis ĝis nun kulojn kaj malsanon, nun produktas tritikon kaj trifolion, kio donas al la vilaĝanoj bonan panon kaj lakton.

Jen, karaj infanoj, tiel la vilaĝanoj ekstermis la lentugan sangosuĉanton aŭ Anofelon.

* * *

FOSISTOJ

Rakonto pri du skabiaj kamparanoj

Maljuna Magiisto estis tre okupita per iu speciala laboro. Li observadis sub mikroskopo iun specialan estaĵon. Tio estis iu insekteto kun ok piedoj, rondforma korpo kaj tre fortika makzelo. Ĝi apartenas al la familio de iksodoj.

La infanoj alvenis kaj li tute ne rimarkis ilin. La infanoj silentis kaj la maljunulo tre serioze rigardis tra okulario.

- Kara Magiisto, kion vi rigardas ? - demandis iu scivolema knabineto.

- Ho, infanetoj, vi estas denove ĉi tie ! Nu, tre bone ! Mi rakontos al vi pri iu loĝanto de la ŝaktoj kaj galerioj. Ĝi kaŭzas la malsanon nomitan skabio aŭ jukmalsano.

- En nia vilaĝo estas multaj homoj malsanaj de tio. Tuta korpo ilia estas plena da krustoj.

- Jes, ankaŭ infanoj povas havi tion. Nu, rigardu tra mikroskopo tiun insekton.

La infanoj unu post la alia rigardis tra la okulario.

- Ho, kion mi vidas !

- Kion vi vidas ? - demandis iu nigrahara knabeto.

- Mi vidas ok krurojn. Kiel ĝi havas fortikan makzelon kaj korpon !

- Tio estas, por ke li povu mordi kaj fosadi - klarigis la maljunulo.

- Kaj al kio servas tiuj haroj ?

- Verŝajne pro tio, ĉar ĝi estas insekto, kaj preskaŭ ĉiuj insektoj surhavas haretojn.

Post tio ĉiuj foriris en ĝardenon kaj la mal-

junulo komencis rakonti.

Foje vivis iu kamparano nomita Matija. Li estis tre bonkora kaj laborema homo. Iun tagon li iris viziti foiron en tre malproksima urbeto. Vespere li decidis tie tranokti kaj li serĉis ĉambron en iu gastejo. Tiu ĉi gastejo estis tre malpura kaj nezorgita, sed la tranoktado estis malmultekosta. Kiam li alvenis, jam ĉiuj ĉambroj estis okupitaj. Matija estis ege laca kaj sopiris liton. La gast-
ejestro proponis al li dormi kun iu alia gasto, kiu same vizitis la foiron. Ne estis alia solvo, kaj li fine akceptis.

Matija kuŝigis sin en la lito apud iu nekonata viro. Li kredis, ke post mallumigo li dormos trankvile. Sed lia kundormanto subite fariĝis tre maltrankvila. Li komencis grati sin. Matija kredis, ke tio estas nur hazarde, kaj komence silentis. Sed post unuhora konstanta gratado Matija decidis peti lin, ke li ĉesu.

- Amiko - diris Matija - ne tiom gratu vin, ĉar mi ne povas dormi. Mi ja estas tre laca.

Sed lia kundormanto ekkriis :

- Se ci ne estas kontenta, iru for !
- Ne diru tion, frato, mi ja estas tre laca !
- Ankaŭ mi estas laca, sed jukas min kaj kiun jukas, li devas grati sin.
- Tio estas vera. Sed, ĉar vi estas kun mi en la sama lito, vi ja devus tamen pensi iomete ankaŭ pri mi.
- Mi pensas nur pri mi. Se ci ne estas kontenta, kuŝiĝu sur la planko.

Dum ili tiel interdisputis, la etaj fosistoj ridegis. Kaj ili estis tre multnombraj sub la haŭto de tiu viro, ke li absolute ne povis dormi.

- Nun ni bonege fartas ! - parolis iu vigla fosisto. De kiam alvenis tiu alia, al ni estas ankorau pli varme. Estas tiel agrable en la mallumo kaj en varma lito !
- Estas perfekte. Ĝis la mateno mi certe trafosos unu centimetron sub la haŭto.
- Ho jes, oni devas eluzi tiun belegan okazon.

Al tiu nia skabiulo volas alveni nek edzino nek infanoj, kaj jen nun tiu bona homo, kiu kuŝiĝis apud li.

- Tiu homo faris al ni grandan servon. Oni devas premii lin. Eniru ni ankaŭ en lian haŭton.

- Kompreneble, ke mi eniros - diris unu fosisto.

Iu ino transiris sur la manon de Matija, kiam lia najbaro iom proksimiĝis. Ŝin sekvis ankaŭ unu masklo.

- Vi ĉiam sekvas min - diris al li la ino.

- Kial vi ne volas min? Ĉiaokaze mi devos baldaŭ morti - mi malaperos de tiu mondo kaj vi ankoraŭ insultas min.

- Mi ne insultas vin. Do, vi enfosu ĉi tie tuj malantaŭ mi. En tiu ĉi fosajo ni restos tute trankvilaj, dum dudek ĝis tridek tagoj. Ĝis tiam mi jam plifortiĝos kaj mia familio povos vivi sen vi.

- Kiom vi estas ĝentila kaj .. bonkora !

Dum okazis tiu translokiĝo de unu al alia homo, la kundormantoj vere suferegis. La kundormanto de Matija konstante gratis sin. Matija, kvankam paciencema homo, fine ordonis al la najbaro :

- Ĉesu grati vin !

- Ne, mi ne volas !

- Ne grataĉu vin, ĉar mi reagos alimaniere.

- Kion vi faros? Vi alvenis en mian liton. Se vi ne estas kontenta, foriru !

En la lito estis pli kaj pli varme, kaj la fosistoj preskaŭ freneziĝis pro ĝojo kaj kontento. Ne troviĝis loko inter la manfingroj kaj tiuj de la piedoj, kie la fosistoj ne troviĝis kaj ili tre vigne fosadis.

- Kiel estas agrable varme. Nur fosu, fratoj, tiel estas agrable. Ni tre ŝatas tiun malluman nokton!

Sed la skabiulo tremadis pro turmentoj. Li vere suferegis. Li neniam ĝis nun tiom suferis kaj liaj haroj hirtiĝis pro nervozeco.

- Sed mi freneziĝos ! - li kriis.

- Ĉu vi tuj freneziĝos? - demandis Matija.

- Vi do volas insulti min !

En tiu momento ekjukis lin la piedo. Li volis grati ĝin, sed levante ĝin, li frapis per ĝi la stomakon de Matija.

- Vi frapis mian stomakon tute sennecese. Do jen al vi ! kaj li frapis lin per la pugno.

Okazis terura interbatalo kaj ili ambaŭ falis sur la plankon.

- Ĉu vi ankoraŭ frapos min ? - kriis Matija.

- Ho ve, li mortigos min ! - kriis la alia.

La gastejo vekigis. Alkuris la gastejestro kaj aliaj gastoj. Dika gastejestro tenis en la mano la buĉistan hakilon por buĉi la brutojn. Lia edzino tenis en la mano la kandelon kaj kriis :

- Helpon! Helpon!

- Malfermu, malfermu la pordon, aŭ mi perfortos la pordon per hakilo !

- Helpon, helpon ! Li sufokos min ' - kriis la najbaro de Matija.

Matija saltis kaj malfermis la pordon.

- Kiu kulpas ? - ekkriis la gastejestro.

- Mi neniel kulpas. Tiu ĉi kulpas - diris Matija kaj montris al la alia.

- Ankaŭ mi ne kulpas.

- Jes, li kulpas. Tuj kiam ni enlitiĝis, li komencis grati sin. Mi ĝentile petis lin, ke li ĉesu. Ju pli longe ni kuŝis, des pli multe li gratis sin. Finfine li frapis min per la piedo en stomakon. Tiam mi frapis ankaŭ lin kaj la interbatado komenciĝis. Fine ni falis sur la plankon. Jen mia ĉemizo estas disŝirita.

- Ne estas tiel. Kiam mi enlitiĝas, ĉiam komencas juki min. Sed hodiaŭ, kiam tiu ekkuŝis apud mi, tiel jukis min, ke mi kredis frenezigi.

- Kaj ĝuste, kiam mi kuŝiĝis apud vi ! Rigardu! Nun mi kulpas, ke lin pli jukas !

La gastejestro fine decidis :

- Vi ne plu dormos kune. Alportu por ili la malnovan peltmantelon kaj aranĝu kuŝlokon sur la planko - diris la gastejestro al sia edzino. Vi interkonsentu, kiu dormos en la lito kaj kiu ĉi

tie.

- Mi dormos sur la planko -diris la skabiulo.
- Bone, mi restos en la lito.
- En ordo - diris la gastejestro - sed la lumo devas resti la tutan nokton, por ke ne okazu de nove interbatalo.

Sed ili jam trankviliĝis.

- Sed, diru al mi, frato - demandis Matija - kial vi tiom gratas vin ?
- Mi ne scias. Sed jam de certa tempo, kiam mi enlitigas, tio komenciĝas. Vi pensis, ke mi estas malbona homo. Ne, sed kiam tio komenciĝas, mi fariĝas tiel nervoza, ke mi ne povas regi min. Tiel okazis ankaŭ tiu interbatalo inter ni pro nenio.
- Vi havas ian malsanon - diris Matija.
- Mi ne estas malsana, mi povas normale labori. Sed vespere en lito tio komenciĝas.
- Strange ! Nu kion fari ? Sed pardonu vi ankaŭ al mi. Mi same ne estas malbona homo.
- Jes, bone. Do, nun ni dormu kaj la lumo restu.

Matija enlitigis kaj la alia sur la plankon.

- Stulte - diris la etaj fosistoj, kial ili lasis lumon !
- Por ke ni trankviliĝu.
- Ho, ni iru profunde en la haŭton, ĉar la lumo ĝenas nin. Nun ni devos resti senmovaj la tutan nokton, kaj tio estas tre enuiga.
- Kiel estis bele, dum tiuj du stultuloj kuŝis unu apud la alia ! Estis tiel varme en la lito, kaj nun tiu ĉi eĉ ne kovris sin. Estas tute malvarme.
- Ĉu vi en najbara kanalo jam inertas ? - demandis iu.
- Bedaŭrinde ni estas inertaj. Kaj kion vi faras tie ?

La maskloj, kiu restas en la komenco de la kanalo, ĉar ili ne povas fosadi, levis la kapojn kaj konstatis, ke la lumo daŭre lumas. Tio ankoraŭ longe daŭros.

Ambaŭ kamparanoj, tre lacaj, ekdormis profunde. Frue matene ili foriris al la foiro. Ĉe la

adiaŭo ili ankoraŭ pardonpetis unu al la alia. Post la foiro ili revenis al siaj hejmoj.

Pasis tri semajnoj. Matija jam forgesis la okazaĵon en la gastejo kaj normale laboris siajn ĉiutagajn taskojn. Subite komencis juki lin kaj li ekgratis sin. Sed pri tio li tute ne atentis. Sed la etaj fosistoj ne restis inertaj. La masklo kaj ino, kiuj tiun nokton transiris sur lian manon, tuj unuiĝis.

- Mi fosos unu kanalon kaj vi kiel kutime restu ĉe la enirejo.

La masklo akceptis kaj la ino ekfosis. Ŝi volis fondi familion. Pro tio ŝi revenis al sia edzeto.

- Ĉu vi ankoraŭ vivas, mia kara edzeto ?

- Jes, mi vivas, kara edzino, kaj atendas vin en la enirejo de la kanalo.

Post tri tagoj jam estis malvaste en la kanalo. Oni devis largigi ĝin. Pro tio la ino elfosis tian da loko, kiom oni bezonis por trideko da ovoj. Ŝi tre atente flegis ilin. Sep tagojn poste ŝi estis tre fiera. Aperis la idoj.

- Ho, kiel ĉarmaj vi estas, infanetoj miaj. Eĉ vi ankoraŭ ne havas ok krurojn sed nur ses. Vi estas ankoraŭ larvoj. Sed ĉiuj inaj larvoj ankoraŭfoje ŝanĝos la aspekton. Poste vi estos samaj kiel via patrino.

Tiun tagon revenis la patrino al la enirejo de la kanalo. Sed kia malĝojo ! Ŝia edzo jam estis morta.

- Vi mortis, malfeliĉa estaĵo ! Sed tio atendas nin ĉiujn. Mi ne havas tempon por priplori vin, ĉar en la kanalo atendas min mia multnombra familio.

Reveninte, la patrino ekkriis :

- Infanoj, via paĉjo mortis. Mi trovis lin morta ĉe la enirejo.

- Ĉu ni povas vivi sen li ?

- Kompreneble, ke vi povas.

- Gravas, ke vi estas kun ni, kara panjo. La patron ni eĉ ne konis.

- Do vi ne estas malĝojaj ?

- Tute ne !

Post kelkaj tagoj la inaj larvoj ŝanĝiĝis kaj ekhavis ok krurojn. La maskloj restis samaj. Ili restis en la supro de la haŭto (epidermo) kaj la inoj ekvojaĝis.

- Infanoj, nur kuraĝe. Hodiaŭ ni organizos konkurson. Kiu el vi plej rapide kaj plej profunde fosos, ŝi estos mia favoratino.

- Estos mi, estos mi - oni aŭdis plurajn voĉojn.

- Do ni decidu pri la profundeco !

- Du milimetrojn.

- Ho, ci eta maldiligentulino. Ĉu vi ne hontas? Pli profunden oni devas fosi.

- Kiom do ?

- Dudek milimetrojn ! Kiu tion faros, estos mia preferatino.

Saman nokton okazis la konkurso. La fosistinoj faris ĉion eblan por kontentigi la patron. Tiun konkurson malfacile eltenis Matija. Li komencis grati sin, kaj fariĝis tre nervoza.

- Kial vi gratas vin - demandis lia edzino ?

Sed nervoza respondo montris, ke lia stato estas tre ekscitita. Matija kun timo enlitiĝis ĉiuvespere. Tiel ne eblas dormi - kaj tiam li rememoris la okazaĵon en la gastejo.

Post certa tempo Matija foriris denove al iu foiro por vendi ĉevalon. Tie li renkontis la tiaman kundorminton.

- Kiel vi fartas, frato ? - demandis Matija.

- Nun tute bone. Mi estis stulta. Kion fari, la homo neniam estas sufiĉe saĝa. Mi tute ne povis dormi kaj fine mi foriris al kuracisto. Li esploris min: - Vi havas skabion de unua grado, diris la kuracisto kaj li ordonis al mi, kion mi faru.

1. - Ke mi post la reveno hejmen dum duonhora lavu la korpon per sapo kaj varma akvo.

2. - Ke mi ŝmiru la korpon per sulfura pomado.

Mi tiel faris kelkfoje kaj mi nun dormas bonege.
- Sed nun mi havas skabion, kiun mi ricevis de vi tiun nokton. Sed ne gravas, ĉar de vi mi ankaŭ eksciis kiel kuraci min. Ankaŭ mi ne povas dormi kaj nur nun mi komprenas viajn turmentojn dum tiu nokto.

Post la foiro Matija aĉetis en apoteko la necesan pomadon. La saman vesperon li bonege lavis sin kaj ŝmiris la korpon per la pomado. Tiun nokton li jam bonege dormis.

La pomado mortigis la fosistojn kaj redonis al la kamarano noktan pacon kaj dormon. Li denove normale vivis kaj plenumis sian utilan laboron.

* * *

BROŝURSERVO DE S.A.T.

adreso : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut
poŝtkonto : 3 374 04 M Bordeaux

Disponeblaj tekstoj pri jenaj temoj :

- * Anarkiismo : Abundo kaj konsumsocio (Duboin, Berthier) - Anarkio kaj organizo (Malatesta) - Bazoj de anarkiismo (Balkanski) - Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) - Etiko I (Kropotkin) - La parlamentisma iluzio (C.A.Laisant) - La liberecana penso (citaĵoj) - La liberecana socio (Bastjan) - Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura) - Memvola servuto (La Boétie) - La piramido de l'tiranismo (Domela-Nieuwenhuis) - Revolucia registaro, La Pariza Komunumo (Kropotkin)
- * Biografio : El la kara infaneco (Valo) - Kontraŭflue (Valo) - Mia vivo (Bartelmes)
- * Ekologio : Atomcentraloj (Levreaud)
- * Filozofio - Psikologio : Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) - Fronte al la vivo (Krishnamurti) - Individuismo en Antikveco (Han Riner) - Individuisma Manlibreto (Han Riner) - Manlibro de nova homo (Rufegon) - Por nia medito (Han Riner, Alain) - Rimarki (Krishnamurti) - La triviala homo (Ingenieros) - La veraj interparoladoj de Sokrato (Han Riner)
- * Por infanoj : La blankaj gardistoj (Heiligstein) -
- * Liberpenso : La krimoj de Dio (Sébastien Faure) - La mistero de nia surtera ekzisto (Archdeacon)
- * Nia lingvo : Lingvaj anguloj (Baronnet)
- * La movado : Adamaĵoj (Lanti) - Informoj pri SAT (LJP) - La laborista esperantismo (Lanti) - Mia vivo (Bartelmes) - Pri la E-literaturo (Laval) - El verkoj de Lanti (Lanti)
- * Literaturo : Argentina novelaro (2 kajeroj) - La ingenia hidalgo Miguel Cervantes (Han Riner) - Prognozio (pola novelaro)

- * Neperforto - Pacismo : Civila malobeemo (Thoreau) - Humanitaristaj principoj (Relgis) - Neperforta revolucio (T.Ebert) - Politika neperforto (M.A.N.) - Por la paco (citaĵoj) - Tiu, kiu ne volas morti (J.Rostand) - Leĝpropono por unuflanka malarmiĝo de Francio (UPF) -
- * Poezio : Jen la Dio! (BGD) - Rido sanigas! (Burger)
- * Politiko - Ekonomio : La forto de la fortaj (J.London) - Homa animo sub socialismo (O.Wilde) - Historia materismo, Socia organizado (Pannekoek) - Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg) - Parabolo pri la cisterno (Bellamy) - La rajto de pigro (Lafargue) - La rentumo, kiun ni pagas (Schmid) - Principoj de Mondsocialismo (Soc. Partio de Kanado)
- * Sciencoj : Antropogenezo (Pannekoek)
- * Sociologio : La migrantoj en Francio nuntempe (P.de Cazenove) - Tabakismo kaj emancipo (Masson) - Vivi en komunumo (M.Schneller)
- * Teatraĵoj : Amo per proverboj (Azevedo)
- * Varbiloj : Esperanto in 24 pages (angla) - Espéranto de poche (franca) - Esperanto en 24 páginas (hispana) - Esperanto su 24 pagine (itala) - Esperanto em 24 paginas (portugala) - Du rêve à la réalité : l'espéranto (Masson) - Linguistique et non-violence (Masson). Tiuj du lastaj broŝuroj estas nur franclingvaj.
- * Vojaĝoj : Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (Alfa-Beta)
- * Diversaĵoj : Komuna Kantareto (LJP) - Noktoj (S.Sire), bildbendo.

Detala katalogo kun abon- kaj mendkondiĉoj estas havebla ĉe La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut.

En diversaj landoj libroservoj kaj broŝurperantoj liveras tiujn broŝurojn.